



EL POPOLA ĈINIO

人民中国杂志

7

1970

Vortoj de Prezidanto Maŭ

Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn.

Unuiĝu por unu celo, nome, firmigi la proletaran diktaturon, kio devas esti efektivigita en ĉiu fabriko, vilaĝo, institucio kaj lernejo.




Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ



La granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj Samdek Norodom Sihanuk, ŝtatestro de Kamboĝo kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kampuča, kune rigardas artfajraĵon nokte de la unua de majo, sur Tian-anmen-pordego.

Nokte de la unua de majo, brilas super Tian-anmen-placo artfajraĵo kaj bolas ĝoje la celebrantaj amasoj.





Prezidanto Mao kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin celebras la Maj-unuan Feston kune kun amaso sur Tiananmen-pordego.



La granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Viceprezidanto Lin ĝoje pasigas la Majunuan Feston kune kun Samdek Norodom Sihanuk, ŝtatestro de Kamboĝo kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kampuča.

Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Ĝoje Celebras la Internacian Laborulan Feston Kune kun Revoluciaj Amasoj de la Ĉefurbo

SUB la bonega situacio enlande kaj internacie, en la triumfaj kantoj de la kelkcentmiliono revolucia popolo de la tuta lando iranta de venko al venko laŭ la navigacia direkto difinita de la Naŭa Kongreso de la Partio, la revolucia instruanto de la proletaro, nia plej estimata granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ ascendis la pordegon Tian-anmen je la vespero de la 1-a de majo, kaj kune kun la laboristaro kaj la vastaj amasoj de armeanoj kaj popolanoj en la ĉefurbo ĝoje celebris la feston Unua de Majo — la Internacian Laborulan Feston unuan en la sepdekaj jaroj.

Kune kun Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin ascendis la pordegon Tian-anmen ankaŭ: Samdek Norodom Sihanuk, ŝtatestro de Kamboĝo kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kampuča (NUFK), kaj Samdek Penn Nouth, privata konsilisto de la ŝtatestro kaj reprezentanto de NUFK.

Kun la novaj sukcesoj en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, kun la grandaj venkoj atingitaj en profunda disvolvado de ba-

talo, kritiko kaj reformo en la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj pluapaŝa plifortigo de la proletara diktaturo, kun la giganta frukto de sukcesa lanĉo de la unua artefarita ter-satelito de nia lando kaj kun la multaj novaj atingoj en teno de revolucio kaj stimulo de produkto, la laborista klaso kaj la laboranta popolo de nia lando renkontis la brilan feston de unuiĝo kaj batalo de la proletaro kaj la laboranta popolo de la tuta mondo. Je la vespero de la festotago, laboristoj, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, komandantoj kaj batalantoj de ĈPLA, revoluciaj kadroj, junaj ruĝgvardianoj kaj revoluciaj intelektuloj de la ĉefurbo, plenaj de ĝojo pro venkoj, torentis de ĉiuj flankoj al la placo de Tian-anmen por celebri la feston de triumfo, raporti siajn sukcesojn al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ili varme hurais pro la granda venko de Maŭzedongpenso, pro la granda venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj pro la granda venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio. Ili plej kore bondeziris al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ senlime longan vivon!



Ĉefurbaj laboristoj kaj laborantaj popolanoj turnas sian rigardon al la pordego Tian-anmen kaj varme akلامas ke la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin ĝoje celebras kune kun amasoj la feston Unua de Majo.

Je la 21-a horo, fine venis la feliĉa momento atendata de ĉiuj! Kiam nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ ascendis la pordegon Tian-anmen per firmaj paŝoj, la orkestro ekludis la grandiozan melodion *Ruĝas la Oriento*. Kun vigla spirito kaj fortika sano Prezidanto Maŭ intervidiĝis kun respondecaj kamaradoj de ĉiuj flankoj de nia lando, honorindaj gastoj kaj senditoj de diversaj landoj, intime manpremis kaj interparolis kun ili. Prezidanto Maŭ iris al la revua centro de la pordego Tian-anmen kaj foje kaj refoje mansalutis al la revoluciaj amasoj sur la placo. La placo de Tian-anmen bolis en ĝojo, miloj kaj miloj da popolanoj kun gaja rideto turnis sian rigardon al Tian-anmen, miloj kaj miloj da ruĝaj koroj direktiĝis al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Svingante la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, la jubilantoj plej entuziasme ĝojkriis foje-refoje: “Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!” “Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!” “Senlime longan vivon al Prezidanto Maŭ!”

Kune kun Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin ĉeestis la celebradon sur la pordego Tian-anmen: membroj de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPĈ Ĝoŭ Enlaj, Ĉen Boda kaj Kang Ŝeng; membroj de la Politika Buroo (PB) de CK de KPĈ en Pekino (listigitaj laŭ la nombro de strekoj de la ĉinaj ideografiaĵoj de la familiaj nomoj) Je Kjun, Giang King, Li Hiannian, Li Zuo-peng, Vu Fahian, Kiu Hujzuo, Jaŭ Venjuan kaj Huang Jongŝeng, alternaj membroj de PB de CK de KPĈ Gi Dengkuj, Li Deŝeng kaj Vang Donghing.

Ĉeestis la celebradon ankaŭ: vicĉefkomitatoj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rerezentantoj Guo Moĵuo, Ngapo Ngavang-ĝigme kaj Ĝoŭ Gianĵen;

vicprezidantoj de la Tutlanda Komitato de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco de la Ĉina Popolo Li Siguang, Fu Zuoji, Hju Deheng kaj Li Dekjuan.

Laŭ invito ĉeestis la celebradon sur la pordego Tian-anmen ankaŭ:

Thakin Ba Thein Tin, estro de la delegacio de CK de la Komunista Partio de Birmo kaj vicprezidanto de CK de KPB kaj Thakin Pe Tint, membro de la delegacio kaj membro de CK de KPB;

Jusuf Adjitorop, estro de la delegacio de CK de la Komunista Partio de Indonezio kaj membro de PB de CK de KPI.

Inter la honorindaj gastoj de diversaj landoj kiuj laŭ invito ĉeestis la celebradon sur la pordego Tian-anmen estis ankaŭ:

sinjorino Norodom Sihanuk; sinjorino Penn Nouth; princino Norodom Ket Kanya, onklino de Samdek Norodom Sihanuk; princino Norodom Soriya Roeungsy, filino de Samdek Norodom Sihanuk; princo Norodom Sihanoni, filo de Samdek Norodom Sihanuk; leŭtenant-generalo Ngo Hou, teknika konsilisto de la ŝtatestro, kaj lia edzino; Huot Sambath, eksterordinara kaj plenrajtigita ambasadoro kaj reprezentanto de NUFK, kaj lia edzino; Sarin Chhak, eksterordinara kaj plenrajtigita ambasadoro kaj reprezentanto de NUFK; Chan Youran, eksterordinara kaj plenrajtigita ambasadoro kaj reprezentanto de NUFK; generalo Duong Sam Ol, ĝenerala inspektoro de la Armitaj Fortoj de la Reĝlando de Kamboĝo, kaj lia edzino; Thiounn Mumm, reprezentanto de NUFK; Rœurng Mach, reprezentanto de NUFK;

Xhorxhi Robo, albana ambasadoro al Ĉinio kaj lia edzino;

Ngo Thuyen, ambasadoro de la Vjetnama Demokratia Respubliko al Ĉinio;

Nguyen Van Quang, ambasadoro de la Respubliko de Suda Vjetnamio al Ĉinio;

Hen Ĝun Ge, ambasadoro de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio al Ĉinio, kaj lia edzino;

Ton Quang Phiet, vicprezidanto de la Vjetnamia-Ĉinia Amikeca Asocio; Pham Dinh Sau, estro de la Amatora Arta Ensemblo de la 4-a Zono de la Vjetnama Demokratia Res-

publiko; Ho Thi Lien kaj Vinh An, vicestroj de la ensemblo.

Je la festa vespero la ĉefurbo de nia granda socialisma patrolando plenis je atmosfero de solidareco, revolucio kaj batalo. Sur la grandioza kaj superba Tian-anmen-placo flirtis ruĝaj flagoj kaj pompe brilis lamplumoj. Giganta portreto de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ pendis meze de la pordego Tian-anmen. Ĉe ambaŭ flankoj de la placo staris gigantaj portretoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin. Antaŭ la Monumento de la Popolaj Herooj disradiis la gigantaj lamplumaj sloganoj: "Vivu la Internacia Laborula Festo Unua de Majo!" "Vivu Marksismo!" "Vivu Leninismo!" "Vivu Maŭzedongpenso!" kaj "Unu-ĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn!" La revoluciaj kantoj *Ruĝas la Oriento, Mar-navigo Dependas de l' Stiristo, Senlime Longan Vivon al Prezidanto Maŭ, Marŝo de Batalo, Laboristaro kaj Kamparanaro Estas de Unu Sama Familio* k. a. laŭte resonis tra la aero super la ĉefurbo.

Je 19:05, la unua artefarita tersatelito de nia lando kun la melodio *Ruĝas la Oriento* denove flugis tra la ĉielo super la ĉefurbo, aldonante al la festa vespero novan brilon. La vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj diris kun fiero: La sukcesa lanĉo de la unua artefarita tersatelito de nia lando ankoraŭfoje pruvis elokvente, ke la potenco de la granda Maŭzedongpenso estas senkompara kaj ke la brava, laborema kaj saĝa ĉina popolo armita per Maŭzedongpenso havas kapablon kaj volon krei unu post alia miraklojn de la mondo kaj per tio fari siajn farendajn kontribuojn al la homaro.

Kiam la vespera festado komenciĝis, la tuta ĉeestantaro stariĝis kaj laŭte kantis *La Internacion*.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Biaŭ rigardis la festajn artfajraĵojn, kune kun Samdek Norodom Sihanuk kaj lia edzino, Samdek Penn Nouth kaj lia edzino kaj aliaj honorindaj gastoj el diversaj landoj kaj kune kun la armeanoj kaj popolanoj en la ĉefurbo. La jubila sceno sur la

placo estis tre kortuŝa, buntaj piroteknikaĵoj grapolojn post grapoloj eksplodis kaj leviĝis en la ĉielon kaj ruĝigis per sia brilo la ĉielon super la ĉefurbo. Sur la placo laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj laŭte kantis revoluciajn kantojn kaj vigle dancis. Iliaj ĝojkrioj kaj slogankrioj sonore penetris ĝis la ĉielo. La amasoj varme prikantis la saĝan gvidon de la Centra Komitato de la Partio kun la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro, varme aklamis la grandajn venkojn de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando kaj la grandajn venkojn de diverslandaj popoloj en la batalo kontraŭ la usona imperiismo, social-imperiismo kaj diverslandaj reakciularoj!

Kiam la vastaj amasoj de laboristoj kaj kamparanoj de la ĉefurbo, kiuj akiris novajn venkojn transpaŝinte la sojlon de la sepdekaj jaroj, feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ en la vespero de la 1-a de majo, ili estis eksterordinare kortuŝitaj. Kiam ili retrorigardis trairitan vojon de sia batalo, ili ĉiuj profunde sentis el la sperto, ke oni estas ĉiam nevenkeblaj, se oni strikte sekvas la gran-

dan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj agas laŭ instrukcioj de Prezidanto Maŭ. Ili faris firman decidon pli kampakte unuiĝi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro, armi sian cerbon per la brila teorio de Prezidanto Maŭ pri daŭrigo de revolucio sub la proletara diktaturo, alte teni la standardon de unuiĝo kaj batalo de la Naŭa Kongreso de la Partio, firme plenumi la grandajn strategiajn orientilojn de Prezidanto Maŭ **“altigi singardemon, defendi la patrolandon”** kaj **“sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”**, firme teni la ĉefĉeneron de la batalo inter la du klasoj, inter la du vojoj kaj inter la du linioj, profunde disvolvi la amasan revolucionan kritikadon, serioze konduki bone la batalon, kritikon kaj reformon, pluapaŝe firmigi la proletaran diktaturon, pli bone efektiviĝi la orientilon de sendependeco kaj memstareco, **sinapogo sur propraj fortoj**, plenumi la ĝeneralan linion **streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie, kaj teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ**

En la brila festo de unuiĝo kaj batalo de la mondaj proletoj, la laboristaro de la ĉefurbo kun revolucia patoso varme aklamas la grandajn venkojn de la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj socialisma konstruado.



milito, por batalakiri ankoraŭ pli grandajn venkojn. La vastaj amasoj de la armeanoj kaj popolanoj esprimis ankaŭ sian volon nepre liberigi Tajvan.

La revoluciaj amasoj de la ĉefurbo esprimis sian varman bonvenigon al la amikoj de diversaj landoj de la mondo, kiuj ĉeestis la vesperan festadon. Kun profunda sento de la proletara internaciismo ili laŭte kriis la sloganojn "Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu! Proletaro kaj la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la tuta mondo, unuiĝu!" k. a., salutis la vere marksism-leninismajn fratajn partiojn kaj fratajn organizojn de diversaj landoj, esprimis firman subtenon al la kontraŭimperiisma kaj kontraŭreviziisma batalo de la heroa albana popolo, firman subtenon al la heroa vjetnama popolo en ĝia konduko de la nacisava milito kontraŭ la usona imperiismo ĝis la fino, firman subtenon al la laosa popolo en ĝia nacisava batalo de rezisto kontraŭ la usona imperiismo, firman subtenon al la kontraŭusona patriota justa batalo de la kamboĝa popolo gvidata de la ŝtatestro Samdek Norodom Sihanuk, firman subtenon al la Komuna Deklaracio de la Plej Alta Konferenco de la Hindaĉiniaj Popoloj, firman subtenon al la japana popolo, korea popolo kaj aliaj popoloj de Azio en ilia batalo kontraŭ la usona-japana reakciularo kiu revivigas la japanan militarismon, firman subtenon al la justa batalo de la palestina popolo, popoloj de la araba golfo kaj aliaj popoloj de la arabaj landoj kontraŭ la usona imperiismo kaj cionismo, firman subtenon al la liberiga batalo de diverslandaj popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj firman subtenon al la revolucia batalo de diverslandaj popoloj de okcidenta Eŭropo, norda Ameriko, Oceanio kaj aliaj partoj de la mondo. La revoluciaj amasoj esprimis, ke la sepcentmiliono ĉina popolo decidis strikte unuiĝi kun la proletaro kaj la revoluciaj popoloj de la tuta mondo por konduki ĝisfine la grandan batalon por faligi la usonan imperiismon, social-imperiismon kaj diverslandajn reakciularojn.

En tiu vespero, ankaŭ en la Pekina Laborista Stadiono, Ŝigingŝan, Ĝongguancun k. a. okazis artfajra vespera festado.

Inter tiuj kiuj ĉeestis la festadon sur la pordego Tian-anmen estis ankaŭ:

membroj de CK de KPCĈ troviĝantaj en Pekino; alternaj membroj de CK de KPCĈ;

respondecaj kamaradoj de ĉiuj ĝeneralaj departementoj, ĉiuj armespecoj kaj iliaj branĉoj de ĈPLA, la Scienca kaj Teknologia Komisiono por Nacidefendo, militaj akademioj kaj lernejoj, pekinaj trupoj kaj la Pekina Garnizono, kaj reprezentantoj de la laborantoj kiuj partoprenis la lanĉon de la unua artefarita tersatelito de nia lando kaj respondecaj kamaradoj de iuj militaj regionoj troviĝantaj en Pekino;

armeaj reprezentantoj, respondecaj kamaradoj kaj reprezentantoj de la revoluciaj amasoj en diversaj departementoj kaj laborgrupoj sub CK de KPCĈ;

membroj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj;

armeaj reprezentantoj, respondecaj kamaradoj kaj reprezentantoj de la revoluciaj amasoj en diversaj departementoj sub la Ŝtata Konsilantaro;

respondecaj kamaradoj de la Plej Alta Popola Juĝejo kaj aliaj unuoj;

membroj de la Konstanta Komitato de la Pekina Revolucia Komitato; reprezentantoj de diversaj rondoj en Pekino;

membroj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Komitato de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco de la Ĉina Popolo.

Inter tiuj, kiuj laŭ invito ĉeestis la vesperan celebradon sur la pordego Tian-anmen, estis ankaŭ:

Djawoto, ĝenerala sekretario de la Afrika-Azia Ĵurnalista Asocio, kaj lia edzino;

Kinkazu Saionĝi, provizora respondeculo de la Plenuma Sekretariejo de la Konstanta Buroo de la Afrikaj-Aziaj Verkistoj;

Gankovskij, vicestro de la sovetunia registara delegacio por la interparoloj pri la landlima problemo inter Ĉinio kaj Sovetunio;

diplomatiaj senditoj de diversaj landoj en Ĉinio kaj iliaj edzinoj.

Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Biaŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ akceptis la ŝtatestrojn de Kamboĝo kaj prezidanton de la Nacia Unueca Fronto de Kampuča (NUFK) Samdek Norodom Sihanuk kaj liajn edzinojn.

Samdek Norodom Sihanuk kaj liajn edzinojn.

JE la posttagmezo de la 1-a de majo, nia plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ akceptis la ŝtatestrojn de Kamboĝo kaj prezidanton de la Nacia Unueca Fronto de Kampuča (NUFK) Samdek Norodom Sihanuk kaj liajn edzinojn.

Samtempe akceptitaj estis ankaŭ: Samdek Penn Nouth, privata konsilisto de la ŝtatestro kaj reprezentanto de NUFK, kaj lia edzino; princino Norodom Ket Kanya, onklino de Samdek Norodom Sihanuk; princino Norodom Soriya Roeungsy, filino de Samdek Norodom Sihanuk; princo Norodom Sihanoni, filo de Samdek Norodom Sihanuk; leŭtenant-generalo Ngo Hou, teknika konsilisto de la ŝtatestro, kaj lia edzino; Huot Sambath,

eksterordinara kaj plenrajtigita ambasadoro kaj reprezentanto de NUFK, kaj lia edzino; Sarin Chhak, eksterordinara kaj plenrajtigita ambasadoro kaj reprezentanto de NUFK; Chan Youran, eksterordinara kaj plenrajtigita ambasadoro kaj reprezentanto de NUFK; generalo Duong Sam Ol, ĝenerala inspektoro de la Armitaj Fortoj de la Reĝlando de Kamboĝo, kaj lia edzino; Thiounn Mumm, reprezentanto de NUFK; Roerung Mach, reprezentanto de NUFK; kaj aliaj.

En la akcepto, Prezidanton Maŭ kaj Vicprezidanton Lin Biaŭ akompanis Ĝoŭ Enlaj, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPĈ kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro; Ĉen Boda, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPĈ; kaj Kang

Je la 1-a de majo, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto, Vicprezidanto Lin akceptis Samdek Norodom Sihanuk, kamboĝa ŝtatestro kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kampuča, liajn edzinojn kaj aliajn honorindajn kamboĝajn gastojn kaj fotiĝis kun ili.



Prezidanto Lin Akceptis Manuk kaj Lian Edzinon

Ŝeng, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPĈ kaj vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rezentantoj.


Kiam Samdek Norodom Sihanuk, lia edzino kaj la aliaj honorindaj kamboĝaj gastoj venis en la akceptan halon, Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin intime manpremis kun ili unu post alia. Prezidanto Maŭ kaj Samdek Norodom Sihanuk interŝanĝis salutojn. Prezidanto Maŭ esprimis varman bonvenigon al Samdek Norodom Sihanuk kaj ĉiuj aliaj honorindaj kamboĝaj gastoj.

Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin fotiĝis en la akcepta halo kun Samdek Norodom Sihanuk

kaj lia edzino, Samdek Penn Nouth kaj lia edzino, kaj ĉiuj aliaj honorindaj kamboĝaj gastoj. Antaŭ kaj post la fotado, en la akcepta halo fojon post fojo sonis varmaj manklakadoj.

Poste, Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin faris longan intiman kaj amikan interparolon kun Samdek Norodom Sihanuk kaj Samdek Penn Nouth. Ĝin ĉeestis ankaŭ Ĝoŭ Enlaj, Ĉen Boda kaj Kang Ŝeng.

En la akcepto kaj fotado, ĉeestis ankaŭ vicministro de la Ministerio de Eksteraj Aferoj Han Nianlong kaj koncernaj respondeculoj Caŭ Ke-kiang, Han Hju kaj Vang Ĝen el la Ministerio de Eksteraj Aferoj.




La Mondaj Popoloj Varme Amas Prezidanton Maŭ




*Malia virino Aneba re-
sanigita de la Ĉina Ku-
raca Taĉmento kaj ŝiaj
najbaroj varme dankas
Prezidanton Maŭ, ke li
sendis bonajn kuracis-
tojn al la malia popolo.*


Alĝeriaj laboristoj studas verkon de Prezidanto Maŭ.



Ĉiliaj laboristoj kondukas strikan batalon tenante Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong.



Greka maristo absorbite legas verkon de Prezidanto Maŭ. Li diris: "Prezidanto Maŭ estas savanto de la homaro, kaj liaj verkoj estas vero por la monda revolucio."



Pakistanaj popolanoj entuziasme rigardas fotojn de la brila figuro de Prezidanto Maŭ.



Marŝu de Venko al Pli Granda Venko laŭ la Direkto Montrita de la Naŭa Kongreso de la Partio

Ĉefartikolo de Ĵurnalo *Renmin Ribao*

La 1-a de aprilo ĉijare estas la unua datreveno de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio kunvokita sub la persona prezido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

La Naŭa Kongreso de la Partio estas kongreso kun profunda influo en la historio de nia partio. La Kongreso resumis la historian sperton de nia partio en la pasintaj 48 jaroj, precipe tiun de la Granda Proletara Kultura Revolucio, komplete likvidis la kontraŭrevolucion reviziisman linion de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, elektis novan centran komitaton kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro kaj prenis la grandan teorion de Prezidanto Maŭ pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo kiel bazan gvidan penson por ĉiuj laboroj de la tuta Partio. Pli kaj pli komplete elmontriĝas la profunda influo de la Naŭa Kongreso de la Partio al la ĉina revolucio kaj la internacia komunisma movado.

En la Naŭa Kongreso de la Partio, Prezidanto Maŭ faris la grandan alvokon **“Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn”**, Prezidanto Maŭ diris: **“Unuiĝu por unu celo, nome, firmigi la proletaran diktaturon, kio**

devas esti efektivigita en ĉiu fabriko, vilaĝo, institucio kaj lernejo.” La pasinta jaro post la Naŭa Kongreso de la Partio estas jaro de unuiĝo, jaro de venko kaj jaro de plifirmiĝo de la proletara diktaturo.

De unu jaro, la tutlanda popolo pluapaŝe disvolvis la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. La granda penso de Prezidanto Maŭ pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo profundiĝis en la korojn de homoj. Gvidate de la granda strategia principo **“sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”**, la tuta Partio, tuta armeo kaj tuta popolo kompakte ligis sian laboron kun la tuta revolucia afero, tiel ke pli altiĝis ilia ideologia nivelo kaj pli grandiĝis ilia revolucia energio. Nia partio kaj nia lando estas firme unuiĝitaj sur la bazo de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, kaj vigle plene unuiĝas ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro.

Sub la standardo de unuiĝo kaj venko de la Naŭa Kongreso de la Partio, daŭre disvolviĝas laŭplane la movado de batalo, kritiko kaj

reformo en la Granda Proletara Kultura Revolucio. La taskoj en ĉiuj stadioj de batalo, kritiko kaj reformo kaj ĉiuj proletaraj politikoj elmetitaj de Prezidanto Maŭ estas efektivigataj en ĉiu regiono kaj ĉiu unuo. La revolucia amasa kritiko disvolviĝas profunde en ĉiuj sferoj. La batalo de purigo de klasaj vicoj klare dislimis la klasajn tendarojn kaj donis baton al la plenmano da klasaj malamiko. La granda laboro de ordigo kaj konstruo de la Partio faris la partiajn organizojn pli puraj, pli firmaj kaj pli vigleplenaj. Ke milionoj da kadroj kaj intelektaj junuloj iris al montregionoj kaj la kamparo por sin kombini kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, tio profunde ŝanĝas la fizionomion de la socio. Sur la vasta tero de nia lando ĉie aperas socialismaj novaj aferoj, kiuj havas senliman vivforton. Sub la direktado de la granda principo de Prezidanto Maŭ **“teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito”**, ĉiam pli prosperas la industria kaj agrikultura produktado de nia lando kaj venas nova alttajo en la nacia ekonomio.

Retrorigardante la unujaran batalan vojon ni povas koncentri nian sperton en unu punkton, nome, ni nepre devas firme agi laŭ instrukcioj de Prezidanto Maŭ. En sia politika raporto al la Naŭa Kongreso de la Partio, Vicprezidanto Lin montris: “La tuta historio de nia partio pruvis la veron: Deviante de la gvido de Prezidanto Maŭ kaj Maŭzedongpenso, nia partio trafas repuŝon kaj malvenkon; kaj strikte sekvante Prezidanton Maŭ kaj agante laŭ Maŭzedongpenso, nia partio antaŭenmarŝas kaj triumfas.” La batalo de unu jaro refoje pruvis tiun grandan veron. La slogano “Mi absolute plenumas instrukciojn de Prezidanto Maŭ, kaj senhezite marŝas kien montras Prezidanto Maŭ” jam fariĝis ŝtala ĵuro de cent-milionoj da revoluciaj popolanoj. Absolute plenumante instrukciojn de Prezidanto Maŭ, ni havas klaran direkton kaj ĝustan metodon; absolute plenumante instrukciojn de Prezidanto Maŭ, ni povas unuiĝi kun plej vastaj amasoj kaj havas neelĉerpeblan forton. Unuvorte, absolute plenumi instrukciojn de Prezidanto Maŭ signifas venkon.

Ĉu ni absolute plenumas instrukciojn de Prezidanto Maŭ, tio estas problemo, ĉu ni havas la proletaran partiecon aŭ ne. La instrukcioj de Prezidanto Maŭ reprezentas la radikajn interesojn de la proletaro. Nur se ni staras ĉe la starpunkto de la proletara partieco, ni povas absolute plenumi instrukciojn de Prezidanto Maŭ. Kiu havas egoismon aŭ burĝaran partiecon kaj ne volas forĵeti interesojn de sia montfortreso kaj sia grupeto, tiu ne povas agi laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ. Ni devas daŭre plifortigi la proletaran partiecon, elimini malhelpon de sektismo, anarkismo kaj reakcia teorio de “multaj centroj”, t. e. tiu de “sencentreco” por garantii plenan efektiviĝon de serio da instrukcioj de Prezidanto Maŭ.

Kiam ni celebras la unuan datrevenon de la Naŭa Kongreso de la Partio, ni ĉiuj devas refoje studi la ekstreme gravajn paroladojn de Prezidanto Maŭ ĉe la Naŭa Kongreso de la Partio, studi la politikan raporton de Vicprezidanto Lin kaj la novan statuton de la Partio. Lige kun la reala stato de nia propra regiono kaj propra unuo ni devas bone pripensi: Ĉu ni plenumis serioze, firme kaj centprocente serion da plej novaj instrukcioj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ pri efektivigo de la granda revolucia unuiĝo, revolucia triflanka kombiniĝo, revolucia amasa kritiko, purigo de klasaj vicoj kaj ordigo kaj konstruo de la Partio; kiel ni devas en sekvontaj tagoj konduki serioze kaj bone batalon, kritikon kaj reformon, pli bone kaj pliapaŝe efektivigi komplete ĉiujn proletarajn politikojn de Prezidanto Maŭ kaj plenumi diversajn batalajn taskojn elmetitajn de la Naŭa Kongreso de la Partio. Estas necese resumi serioze sperton, disvolvi sukcesojn, trovi mankojn kaj ellabori metodojn por akiri pli grandajn venkojn.

Prezidanto Maŭ montris: **“Ni jam akiris grandan venkon. Sed la venkita klaso ankoraŭ faros barakton. Ankoraŭ ekzistas tiuj homoj kaj tiu klaso.”** Ni devas firme teni la ĉefĉenon de batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj, plifortigi diktaturon super la plenmano da klasaj malamiko en politika, ekonomia, ideologia kaj kultura sferoj, eltiri profunde kaŝitajn kontraŭrevoluciulojn por likvidi latentan danĝeron kaj eduki posteulojn.

Nova Alta Tajdo de Revolucio kaj Produkto en Nia Lando

JAM forpasis pli ol unu jaro post la venka okazigo de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio. Dum tiu tempo, sub la kuraĝigo de la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “**unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn**” kaj gvidado de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin Biao kiel la vicestro, la diversnaciecaj popolanoj de nia lando levis novan altan tajdon en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Nia granda socialisma patrolando fariĝas pli prospera kaj potenca.

LA BRILO DE MAŬZEDONGPENSO LUMIGAS NIAN VASTAN PATROLANDON


“Marnavigo dependas de stiristo, kaj revoluciado dependas de Maŭzedongpenso.” De la okazigo de la Naŭa Kongreso de la Partio, la granda amasa movado de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso en nia lando vikle leviĝas pli granda-skale kaj pli profunde. Sub la gvido de la Partio la diversnivelaj revoluciaj komitatoj de 29 provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj kaj diversnivelaj gvidaj organoj de ĈPLA gvidis la vastajn amasojn de armeanoj kaj popolanoj serioze studi, kun senkompare profunda sento de la proletaro al la

Estas necese daŭre disvolvi revolucion amasan kritikon kontraŭ imperiismo, social-imperiismo, ideologio de moderna reviziismo, ĉiuj montriĝoj de reakcia burĝara ideologio kaj diversaj eraraj tendencoj kontraŭaj al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, por pluapaŝe altigi memkonscion de la vastaj revoluciaj amasoj en efektivigado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Por plenumi la diversajn batalajn taskojn elmetitajn de la Naŭa Kongreso de la Partio, estas necese pluapaŝe plifortigi gvidon de la Partio. La Partio realigas sian gvidon pere de la partiaj organizoj de ĉiuj niveloj, kiuj kondukas la vastajn revoluciajn amasojn efektivigi la linion, principojn kaj politikojn ellaboritajn de Prezidanto Maŭ. Ĉiuj membroj de la Partio kaj revoluciaj amasoj devas pro-

funde kompreni la doktrinon de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso pri la rilatoj inter la gvidanto, politika partio, regpotenco, klasoj kaj amasoj, kaj konscie defendi unuigitan gvidon de la Partio. La partiaj organizoj de ĉiuj niveloj devas sekvi instruojn de Prezidanto Maŭ, laŭ la postuloj de la nova statuto de la Partio, kompakte ligiĝi kun la amasoj, konstante aŭskulti iliajn opiniojn kaj postulojn kaj plene disvolvi aktivecon kaj kreivon de la vastaj amasoj. Ju pli bona estas la situacio, des pli ni devas esti **modestaj kaj singardemaj, sed ne fieraj kaj malpaciencaj.**

Ni alte tenu la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso kaj marŝu de venko al pli granda venko laŭ la direkto montrita de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!



La Daking-a Petrola Rafinejo estas en vigloplena produktado.

granda gvidanto Prezidanto Maŭ, lian grandan teorion pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo, la ekstreme gravajn paroladojn faritajn de Prezidanto Maŭ en la Naŭa Kongreso de la Partio, la politikan raporton faritan de Vicprezidanto Lin Biaŭ al la kongreso, la novan statuton de la Partio, kaj la historian sperton de la batalo inter la du linioj en la Partio; aperis diversaj kursoj de Maŭzedongpenso kiel bambuidoĵoj post printempa pluvo. La amasa movado de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso estas levita al nova etapo, kaj aperis nova nivelo kaj kreiĝis novaj spertoj en la studado kaj aplikado.

La diversnivelaj partiaj organizoj kaj revoluciaj komitatoj de diversaj fakoj kaj institucioj de la ĉefurbo Pekino organizis vastajn amasojn en studrondojn kun plifirmigo de la revolucia unuiĝo kiel la ĉefa temo, en kiuj la vastaj revoluciaj amasoj forte kritikis la burĝaran sektismon, la reakcian teorion de “multaj centroj” t. e. tiun de “sencentrecio”, anarkismon k. a. burĝarajn reakciajn ideojn kaj erarajn tendencojn de dekstre aŭ de ultra-“maldekstre” kaj multe plifortigis sian proletaran partiecon. En la tuta urbo, rapide aperis bonega situacio de unuiĝo kaj batalo kaj plie solidiĝis

kaj disvolviĝis la granda revolucia unuiĝo kaj revolucia triflanka kombiniĝo. Tio forte batis plenmanon da klasaj malamikoj kaj plifirmigis la diktaturon de la proletaro.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruis al ni: **“Ni jam akiris grandan venkon. Sed, la venkita klaso ankoraŭ faros barakton. Ankoraŭ ekzistas tiuj homoj kaj tiu klaso. Tial, ni ne devas diri pri la fina venko. Kaj ni ne devas tion diri ĉe en venontaj kelkdek jaroj. Ne perdu singardemon.”** Laŭ tiuj instruoj la laboristaro en Ŝanhajo ĉiam atentis pri analizo de nova movdirekto kaj novaj trajtoj de klasa batalo kaj iniciatas aktive atakojn kontraŭ la subfosaj aktivadoj de klasaj malamikoj. Pere de kritikado al la subfosaj aktivadoj de klasaj malamikoj, al kapitalismaj tendencoj, al burĝara ideologio kaj al reviziismo, la Dudekunua Ŝtata Kotona Teksejo, la Vuging-a Kemia Fabriko, la Dua Ilmaŝina Fabriko, la Fabriko de Prestinkturaj Maŝinoj k. a. entreprenoj en Ŝanhajo laŭplane donis batojn kontraŭ la korodoj kaj subfosadoj de la burĝaro, por ke la granda Maŭzedongpenso okupu ĉiujn poziciojn, kaj tiel plie disvolvis la bonegan situacion en la revolucio kaj produktado.

La Ĉina Popola Liberiga Armeo estas fortika apogilo de la proletara diktaturo. Firme plenumante la gravan instrukcion donitan de Vicprezidanto Lin en la Naŭa Kongreso de la Partio “profunde disvolvi la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso”, la komandantoj kaj batalantoj de la tuta armeo pli vaste kaj pli profunde studas kaj aplikas vive la grandan teorion de Prezidanto Maŭ pri daŭra revolucio sub la diktaturo de la proletaro. La kadroj kaj batalantoj de iu roto de la Ŝenjang-a Trupo, kiu estas honorita kiel Avangarda Roto en Studo de Verkoj de Prezidanto Maŭ, kun demandoj en la batalo por firmigo de la proletara diktaturo, studis tiun grandan teorion de Prezidanto Maŭ, efike levis sian konscion de daŭra revolucio. Konstante farante analizon pri nova movdirekto de klasa batalo en la socio, la partia filio de la kvara roto de iu trupo gardanta antaŭpozicion ĉe la Suda Ĉina Maro kondukis la kadrojn kaj batalantojn al studo de Maŭzedongpenso en ligo kun siaj aktualaj pensoj, tiel ke ĉiuj multe plifortigis la konceptojn pri klasa batalo kaj la proletara diktaturo kaj plie fortigis sian konscion en plenumado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La komandantoj kaj batalantoj de la tuta ĈPLA foje-refoje studis la instruon de Prezidanto Maŭ: “Popoloj de la tuta mondo, unuiĝu kaj oponu kontraŭ agresa milito lanĉita de iu ajn imperiismo aŭ social-imperiismo, precipe kontraŭ agresa milito kun atombomboj kiel armiloj! Se okazos tia milito, la popoloj de la tuta mondo devos ekstermi agresan militon per revolucia milito, kaj de nun devas sinprepari!” kaj tiel deradike plifortigis la ideon de sinpreparo kontraŭ milito kaj pli klare konsciis la grandan devon en defendo de la proletara diktaturo. Firme efektivigante la grandajn strategiajn principojn de Prezidanto Maŭ “altigi singardemon, defendi la patrolandon” kaj “sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”, ili pliapaŝe fortigis la konstruon de la armeo en starigo de revolucio kaj bataleco dum kreado de rotoj kun kvar bonoj kaj plenumado de subtenado al agrikulturo, industrio kaj maldekstruloj kaj de milita kontrolo kaj milita-politika trejnado, kaj aliaj taskoj.

De pli ol unu jaro, en la plenumado de efektivigado de diversaj bataltaskoj elmetitaj de la Naŭa Kongreso de la Partio, la tuta partio, tuta armeo kaj diversnaciecaj popolanoj de la tuta lando memkonscie unuigis siajn konon, politikon, planon, komandon kaj agadon per Maŭzedong-

penso. La granda amasa movado de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso akcelas la socialisman revolucio kaj socialisman konstruadon de nia lando akiri unu grandan venkon post alia.

VIGLE IMPETAS LA GRANDA AMASA MOVADO DE BATALO, KRITIKO KAJ REFORMO

Sub la standardo de unuiĝo kaj venko de la Naŭa Kongreso de la Partio, la movado de batalo, kritiko kaj reformo de la Granda Proletara Kultura Revolucio vaste kaj profunde disvolviĝas sur diversaj frontoj.

En diversaj lokoj de la lando ĉie disvolviĝas la granda movado pri ordigo kaj konstruo de la Partio sub la brilo de la nova partia statuto kaj la granda programo de Prezidanto Maŭ por ordigo kaj konstruo de la Partio “La partiaj organizoj

La Ginĝoŭ-a Fabriko de Minaj Maŝinoj sukcese provfabrikis ekipaĵon por likvigi heliumon kaj tiel faris novan kontribuon por disvolvo de scienco kaj tekniko de malalta temperaturo en nia lando. Jen laboristoj kaj teknikistoj de ĝia provfabrika grupo studas problemon pri altigo de pumpita gaskvanto de la kompresoro.



devas konsisti el la progresemaĵoj de la proletaro; ili devas esti vigloplenaj avangardaj organizoj kapablaj gvidi la proletaron kaj la revoluciajn amasojn por batali kontraŭ la klasa malamiko". En tiu amasa movado, la vastaj amasoj de kompartianoj serioze studis la grandan ideon de Prezidanto Maŭ pri la partia konstruo, la politikan raporton de Viceprezidanto Lin kaj la novan statuton de la Partio, kritikis la kontraŭrevolucionan revizisman partikonstruan linion de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, tiel ke senprecedence altiĝis ilia konscio pri daŭra revolucio kaj multe plifortiĝis ilia koncepto pri la Partio kaj ilia revolucio, sciencoco, organiziteco kaj discipliniteco de la proletaro. Post la fino de la ordigo de la partia filio de la Ŝatoŭ-brigado de Ĉang-an-komunumo de Dongvan-gubernio, Guangdong-provinco, la vastaj amasoj de la partianoj aktive studas kaj aplikas vive Maŭzedongpenson, donante ekzemplon al la amasoj. Inter la dek tri kompartianoj de la brigado naŭ estis elektitaj de la amasoj kiel aktivuloj de viva studo kaj viva

apliko de Maŭzedongpenso. Post la ordigo kaj konstruo de la partia organizo, la partianoj de la Daniuling-brigado de Dongfeng-komunumo de Liaŭĵang en Liaŭning-provinco ĉiuj strebis por fariĝi sturmantoj en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento. Ili gvidis la komunumanojn lerni de la daĝaj-anoj, iri la socialisman vojon, apogi sin sur la propraj fortoj en transformado de la naturo, por turni la malriĉan montvalon en riĉan grenproduktejon.

Post ordigo kaj konstruo, la partiaj organizoj fariĝis pli puraj, firmaj kaj vigloplenaj kaj fariĝis fortika komandejo, kiu gvidas la proletaron kaj revoluciajn amasojn en batalo kontraŭ klasaj malamikoj. Por gvidi la vastan amason de partianoj pli strikte sekvi la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ, la partia komitato de la Tria Lana Teksejo de Ŝanhajo organizis en la tuta teksejo kursojn "por esti bonaj kompartianoj de Prezidanto Maŭ", farante al la partianoj profundan edukadon pri Marksismo-Leninismo-Maŭ-

Post ordigo kaj konstruo de la Partio en la Pekina Universitato, novaj partianoj rapide progresas sub la nutrado de Maŭzedongpenso. Jen novaj partianoj de la filozofia fakultato studas verkon de Prezidanto Maŭ kune kun membro de la laborista propaganda taĉmento (la dua de dekstre).



zedongpenso. Iu kompartiano, kiu havis membrecon de 31 jaroj, kritikis mem sian eraran penson pri tio ke li jam faris sufiĉe por revolucio, komparante sian agon kun postulo de la nova partia statuto, kaj pli alte levis sian revolucion spiriton por decideme revolucii ĝis la fino, strikte sekvante Prezidanton Maŭ.

Dum pli ol unu jaro, la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kondukis la amasan revolucion kritikadon tra la tuta procezo de batalo, kritiko kaj reformo, farante ĝin potenca movforto por efektiviĝi diversajn taskojn. En ĉiu etapo de batalo, kritiko kaj reformo, la Metalurgia Fabriko de Ŝenĵang prenis amasan revolucion kritikadon kiel vojokondukon por antaŭenpuŝi venkan iradon de la taskoj. Ĝi forte kritikis la kontraŭrevolucionajn reviziismajn absurdaĵojn de la granda renegato Liu Ŝaŭki, kiaj “administrado de fabriko per specialistoj” kaj “filozofio de sklaveco antaŭ fremdlanduloj” kaj firme plenumis la amasan linion kaj la grandan orientilon de Prezidanto Maŭ “**sinapogi sur propraj fortoj**”, kio akcelis viglan disvolvon de la amasa movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio. En 1969 estis efektivitaj 54 gravaj teknikaj renovigoj, krome la laboristoj forte kritikis la burĝaran stilon de lukseco kaj malŝparemo kaj disvolvis la revolucion tradicion de penema luktado en malfaciloj kaj praktiko de rigora ŝparado. Sole dank’ al riparo kaj utiligo de eluzitaj objektoj, la fabriko jam ŝparis por la ŝtato pli ol 400,000 *yuan*. Pere de amasa revolucia kritikado multaj fabrikoj rompis la malraciajn regulojn kaj sistemon, perfektigis la pasintajn kaj starigis la novajn. En la kamparaj popolaj komunumoj, kun Maŭzedongpenso kiel armilo, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj aliaj komunumanoj plie kritikis profunde la nigrajn varojn distrumpetitajn de Liu Ŝaŭki, kiaj “tri pliigoj kaj unu fikso”, “kvar liberoj”, “komando per laborpoentoj” k. a., firme starigis la ideon terkulturi por la revolucio, kaj batalakiris unu riĉrikolton post alia.

Strikte sekvante la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ, kun la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko k. a. avangardaj unuoj kiel ekzemploj, la vastaj revolucionaj amasoj sur diversaj frontoj de la tuta lando senŝanceliĝe efektivas diversajn proletarajn politikojn de Prezidanto Maŭ en la granda amasa movado de batalo, kritiko kaj reformo. En la sferoj de politiko, ideologio, kulturo kaj ekonomio, ĉiuj unuoj nun plenumas profunde kaj detale la diversajn taskojn de batalo, kritiko kaj reformo. La batalo de purigo de klasaj



La granda kvanto da kemisterko produktita de la Nankina Kemisterka Fabriko atendas transportadon.

vicoj klare dislimis la klasajn tendarojn kaj donis baton al la plenmano da klasaj malamikoj. Milionoj da kadroj kaj intelektaj gejunuloj iris al montregionoj kaj vilaĝoj por kombiniĝi kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj; tio profunde ŝanĝis la fizionomion de la socio. Novaj socialismaj aferoj kun senlima vivpovo jam aperis ĉie sur la vasta tero.

PROSPERE LEVIĜAS NOVA ALTA TAJDO EN INDUSTRIA KAJ AGRIKULTURA PRODUKTADO

Post la Naŭa Kongreso de la Partio nova alta tajdo de teno de revolucio, stimulo de produkto, akcelo de laboroj kaj de sinpreparo kontraŭ milito vige leviĝas en diversaj lokoj de nia lando. La laboristaro, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj aliaj revolucionaj popolamasoj de la tuta lando firme efektivas la grandan strategian

ideon de Prezidanto Maŭ “sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo” kaj plenamplekse plenumas la ĝeneralan linion “streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie” kaj la grandan orientilon “sinapogi sur propraj fortoj” kaj “peneme lukti en malfaciloj” elmetitajn de Prezidanto Maŭ, tiel ke aperis bonega situacio en la industria kaj agrikultura produktado.

Sur la industria fronto, la vastaj amasoj de laboristoj prenas Daking kiel ekzemplon, alte tenas la brilan standardon de la “Ĉarto de Anŝan-a Ferŝtala Kompanio” propramane ellaborita de Prezidanto Maŭ, elstarigas proletaran politikon, energie kondukas amasan movadon, multe faras teknikan renovigon kaj teknikan revolucion kaj akiris brilajn atingojn. En la pasinta jaro, la totala valoro de la industria produkto superis la rekordon en la historio. Rapide progresis la laboroj en grandaskala fundamenta konstruado. La kvantoj de plenumitaj fundamentaj konstruoj en diversaj lokoj de la lando grandmezure kreskis en komparo kun tiuj en 1968. Post eniro en la jaron 1970, multaj fabrikoj kaj minejoj sur la pro-

duktaj frontoj de fero, ŝtalo, karbo, maŝinfarado, petrolo, kemio, ŝpino, teksado k.a. superplenumis la produktan planon de la unua trimestro.

La 24-an de aprilo 1970, nia lando sukcese lanĉis nian unuan artefaritan tersateliton. Tio estas bona komenco por nia lando en disvolvado de spaca teknologio, granda venko de la granda Maŭzedongpenso, granda venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj alia giganta frukto de la Granda Proletara Kultura Revolucio.

La laboristaro de nia lando starigis por si altan heroan celon kaj klopodas surgrimpi altajn pintojn de scienco kaj tekniko. Grandanombre aperis novaj sukcesoj en scienca esplorado kaj teknika renovigo, kiuj atingis aŭ superis la progresintan nivelon de la mondo. De pli ol unu jaro, en Pekino kaj Ŝanhajo aperis jam nombro da novaj elektronaj produktaĵoj de progresinta nivelo. Nun, la vastaj revoluciaj laboristaj amasoj de la fronto de elektrona industrio jam produktis milojn da specoj de elektronaj produktaĵoj kaj kreis multajn novajn teknikojn, materialojn kaj teknologiojn.

Sub la direkto de la granda orientilo de Prezidanto Maŭ “sinapogi sur propraj fortoj” kaj



Disvolvante spiriton de komunisma kunlaboro, iuj fabrikoj en Ŝanhajo sukcese provfabrikis aŭtomatan vertikalan frezmaŝinon direktatan en procedado de elektrona komputilo cifero-tipa kun monde progresinta nivelo.

“**peneme lukti en malfaciloj**”, la revoluciaj laboristoj de la Ŝanhaja Fabriko de Koloraj Metaloj, la Ŝanhaja Laminejo de Koloraj Metaloj k. a. kvar malgrandaj fabrikoj en Ŝanhajo, uzante siajn disponeblajn simplajn ekipaĵojn, kaj per indiĝenaj metodoj sukcesis fabriki en mallonga tempo specialan altklasan alojladon urĝe bezonatan de la ŝtato. Kaj en malpli ol tri monatoj, post reformo de malnovaj ekipaĵoj kun investo de nur kelkcent mil *yuan*, ili jam povis grandskale produkti la novan fabrikaĵon kontribuante al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.


La diversaj provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj de nia lando, ĉiuj entreprenas diversajn lokajn malgrandajn kaj mezajn fabrikojn, kiaj malgrandaj fabrikoj de fero kaj ŝtalo, de maŝinoj, de kemiaĵoj kaj malgrandaj karbminejoj kaj elektraj centraloj, kiuj floras ĉie kiel montaj floroj. Tiuj de Gianghi-provinco jam povas fabriki kamionojn, malgrandajn traktorojn, generatorojn, dizelojn kaj aliajn ĉ. cent gravajn industriajn produktaĵojn.

Por plie efektivi la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ “**teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito**” kaj

gajni gloron por nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj nia granda socialisma patrolando per elstaraj atingoj en revolucio kaj produkto, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio en Pekino proponis en septembro de 1969 al kvar ferŝtalaj kompanioj de Vuhan, Baŭtoŭ, Tajjuan kaj Ĉongking la socialisman revolucian konkurson. Tiu propono tuj ricevis varman akcepton de la vastaj revoluciaj amasoj de la kvar frataj unuoj kaj tiuj sur aliaj frontoj, tiel ke en la tuta lando leviĝis movado de socialisma revolucia konkurso kompari kun, lerni de kaj strebi por fariĝi avangardoj. Ĝi forte impulsis la industriajn produkton de nia lando.

Sur la agrikultura fronto, efektivigante plie la grandajn orientilojn de Prezidanto Maŭ pri energia entreprenado de la socialisma agrikulturo kiaj “**lerni de Daĝaj en agrikulturo**” k. a., la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj, malsuperaj mezkamaranoj kaj aliaj komunumanoj, same kiel la daĝaj-anoj, sin apogas sur propraj fortoj, peneme luktas en malfaciloj, terkulturas por la revolucio, kaj tiel batalakiris en la pasinta jaro riĉan rikolton

Nia alia 15,000-tonela oleŝipo “Daking 29” lastatempe estis lanĉita en Hongki-ŝipkonstruejo.



de greno kaj kotono post la riĉaj rikoltoj en la lastaj sinsekvaj jaroj en agrikultura produktado.

En la dek gubernioj de la antaŭurboj de Ŝanhajo, en kiuj dum ses sinsekvaj jaroj, la meznombra pomua produktokvanto de sensemigita kotono superis 50 kg. kaj tiu de greno superis 500 kg., kaj en Ĝegiang-provinco, kies meznombra pomua produktokvanto de greno jam superis la normon difinitan en la "Programo de Agrikultura Disvolviĝo de la Tuta Lando", la vastaj amasoj de malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj kaj aliaj komunumanoj nun profunde disvolvas amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, kritikis la erarajn pensojn ke ili jam atingis kulminon en pliprodukto k. a., kaj strebas al pli alta rikolto de greno kaj kotono. En la ebenejo norde de la rivero Huajhe en Anhuj-provinco, kie de antaŭlonga tempo estas loko kun malalta rikolto kaj oftaj naturaj katastrofoj, la vastaj amasoj de malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj kaj aliaj komunumanoj streĉas sian energion por transformi sian lokon kun oftaj naturaj katastrofoj en riĉan grenproduktejon. En la pasinta vintro kaj printempo ĉijare, ili profunde fosis la kampojn kaj plibonigis la grundon sur areo de pli ol 3,400,000 muoj. Tiu cifero superis la

totalan areon de la jaroj post la Liberiĝo. En la vasta kamparo de la tuta lando leviĝis alta tajdo de fundamenta konstruado de agroj kun akvoutiliga konstruado kiel centro, kaj estas atingitaj okulfrapaj sukcesoj, kio kreis pli bonajn kondiĉojn por agrikultura riĉrikolto de la nuna jaro.

Dank' al la rapida disvolviĝo de la industria kaj agrikultura produktado en nia lando, la merkato ĉiam pli prosperas kaj la prezoj de varoj stabilas. Ĉie en la lando regas prospereco.

Nun laborfervoro bolas en la urboj kaj vilaĝoj tra la tuta lando. Firme memorante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "**Ĉinio devas fari relative grandan kontribuon al la homaro**", la tuta partio, tuta armeo kaj diversnaciecaj popolanoj de la tuta lando pli kompakte unuiĝas ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro, pli alte tenas la grandan standardon de unuiĝo kaj venko de la Naŭa Kongreso de la Partio, prenas la jam akiritajn venkojn kiel novan startpunkton de daŭra revolucio, pli bone kaj pli rapide plenumas la diversajn bataltaskojn elmetitajn de la Naŭa Kongreso de la Partio, konstruas la grandan socialisman patrolandon en pli potenca kaj faras novajn kontribuojn por la ĉina kaj monda revolucio.

Veterano de la Ruĝa

Armeo – Ĉen Tianlong

KAMARADO Ĉen Tianlong, aktivulo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kaj estro de iu riparejo de la Kantona Trupo, estas veterano de la Ruĝa Armeo.

Dum la militaj jaroj, Ĉen Tianlong transpasis neĝajn montojn kaj marĉajn stepojn kaj brave batalis ĉie por revolucio, strikte sekvante nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. Post la venko tra la tuta lando, li disvolvas la gloran tradicion de la Ruĝa Armeo pri penema luktado en malfaciloj kaj brave marŝas antaŭen sur la batala vojo de daŭra revolucio, observante la grandan instruon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ ke "**la kamaradoj daŭre restu modestaj, singardemaj, liberaj de aroganteco kaj senpacienco**

en sia laborstilo, ke la kamaradoj daŭre konservu sian stilon de modesta vivado kaj penema luktado".

"REVOLUCIO ESTAS MIA PLEJ ALTA OFICO"

Iutage, kiam li refoje studis la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio* kaj legis la supre menciitan instruon de Prezidanto Maŭ, li rememoris la mizeran vivon dum sia infanaĝo, la malfacilajn militajn jarojn post sia partopreno en la Ruĝan Armeon kaj la kunbatalantojn martiriĝintajn en bataloj ... kaj liaj pensoj agitiĝis kiel tajdo en lia cerbo kaj longe ne povis kvietiĝi: Estas Prezidanto Maŭ, kiu

savis min el la maro de mizero kaj kondukis min sur la revolucion vojon, estas miloj kaj dekmiloj da martiroj, kiuj gajnis hodiaŭan feliĉon per sia sango; kaj mi havas nenian motivon por esti fera pro merito. Ju pli longtempe oni revolucias, des pli oni devas **“daŭre resti modestaj, singardemaj, liberaj de aroganteco kaj senpacienco en sia laborstilo”**, dediĉi sin al la dispono de la Partio kaj ĉiam ludi rolon de ŝraŭbo en la revolucio.

Tio estis ĝuste grandaj instruoj de Prezidanto Maŭ, kio ebligis, ke Ĉen Tianlong en longa tempo povis senrezerve obei al interesoj de la revolucio kaj ĉiam teni en si viglan revolucion batalvolon, sendiference en ajna okazo ĉu li laboras kiel gvidanto, ĉu kiel ordinara laboranto.

Kiam Ĉen Tianlong funkciis kiel estro de iu arma staplo, sub kiu estis iu riparejo provizore dependa al ĝi. Ĉar tiu riparejo ne havis respondecan gvidan kadron, troviĝis kompare multaspecaj pensoj inter ĝiaj laboristoj, oficistoj kaj soldatoj. La gvida instanco decidis postenigi lin kiel la riparejestron por bone ordigi ĝian laboron. Kiam la gvida instanco demandis lin pri lia opinio, li ripetis sian kutiman respondon: “Mi tute estas je la dispono de la Partio!” Fakte, lia oficŝanĝo ne limiĝis je tiu fojo. En militaj jaroj li de la pozicio de kadro estis transpostenigita al tiu de soldatariparisto, de tiu de sekciestro al tiu de ordinara mekanikisto. Ĉiufoje li obeis al la bezono de la revolucio kaj diligente laboris tie, kien lin sendis la Partio.

Antaŭ ol veni al la nova posteno, Ĉen Tianlong kiel kutime studis refoje la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo* kaj lian instruon de du **“restu”**. Li pensis, ke li, kiel veterano, devas havi la sintenon de kamarado Ĝang Side, fari ĉion kion asignis al li la Partio. Preni la intereson de revolucio grave kaj obei al bezono de la Partio estas devo de ĉiu komunisto. La sekvintan tagon Ĉen Tianlong venis al la riparejo en serena humoro. Demetinte sian tornistran, li tuj iris al laborejo kaj riparis maŝinojn kune kun kamaradoj. Iuj opiniis ke Ĉen Tianlong malpromociiĝis kaj lia potenco reduktiĝis. Ĉen Tianlong diris: “Prezidanto Maŭ diris: **‘Ni komunistoj ne celas fariĝi estroj, sed fari revolucion’**; revolucio estas mia plej alta ofico.”

En la dekkelkaj jaroj, dum kiuj Ĉen Tianlong funkciis kiel estro, grandaj ŝanĝoj okazis en la riparejo. Multaj kamaradoj estis promociitaj. Ĉen Tianlong estis plena de ĝojo, opiniante, ke tio estas manifestiĝo de disvolvo kaj prospero de



Kamarado Ĉen Tianlong riparas maŝinon.

la revolucia afero. Kiam iama kuriero sub Ĉen Tianlong estis promociita al staploestro, li ĝoje helpis lin porti valizon al la staplo kaj kuraĝigis lin bone labori sur la nova posteno.

Eduko per agoj multe pli efikas ol eduko per vortoj, la modelaj kondutoj de la maljuna ripareja estro profunde edukis liajn kamaradojn. Ili elmetis sonorajn sloganon: “Ni voluntas labori kiel riparistoj dum la tuta vivo pro la revolucio, same kiel nia maljuna estro!”

Ĉiufoje, kiam Ĉen Tianlong iras kun ripara grupo por labori en trupoj, li difinis al la grupanoj ekstran “disciplinan regulon”: ne diru ke li estas veterano de la Ruĝa Armeo. Pro tio multaj kadroj kaj soldatoj de trupoj ne scias tion. Vidinte lin plena de energio kaj lerta en riparaj laboroj, ĉiuj intime nomas lin “veterana laboristo” kaj laŭdas: “Brave, la veterana laboristo estas energiplena kvazaŭ junulo!” Li riparas aŭtojn kaj motorciklojn, kaj eĉ radioricevilojn, elektrajn torĉojn, fajrilojn. Kaj li riparas ankaŭ plastajn sandalojn por batalantoj. Tiuj diris: “La veterana laboristo ja rifuzas nenian peton!”

Ĉen Tianlong ofte diris: “Por revolucio, oni devas preni sur sin pli pezan ŝarĝon kaj iri renkonte al malfaciloj kaj danĝeroj!”

Iutage, iu trupo alsendis maŝinon por riparigi. Sed la riparejo ne posedis bezonatan ekipaĵon por ripari la maŝinon. Iuj intencis transsendi ĝin al alia unuo. Tamen la transsendo postulas pli da elspezo kaj tempo, kion Ĉen Tianlong ne konsentis. Li diris: "Laboro ja signifas venki malfacilojn. Lasu tiun taskon al mi!"

Dum la somermezo en la sudo oni ŝvitas pluve. Kune kun sia helpanto Ĉen Tianlong ekprenis instrumentojn kaj komencis labori en la varma laborejo. Por rapide plenumi taskon, li daŭre laboris eĉ dum tagmezaj ripozhoroj. Se vespere okazis kunveno, li daŭrigis la laboron post la kunveno. Post penado de kvar tagnoktoj, Ĉen Tianlong kaj lia helpanto fine solvis malfacilojn unu post alia kaj sukcese plenumis la taskon. Rigardante liajn kongestitajn okulojn kaj sangvezikojn sur la manoj, liaj kamaradoj tre emociite diris: "Nia maljuna estro ja estas ŝtala revoluciulo!"

Tia estas Ĉen Tianlong, kiu ĉiam radikigiĝas en la amasoj kaj konservas sian naturon de ordinara soldato.

En majo de la lasta jaro, Ĉen Tianlong studis en la supera institucio la dokumentojn de la Naŭa Kongreso de la Partio. Je la sekvinta tago, estis aranĝita komunika kunveno por la batalantoj pri la kongreso. Por ke ĉiuj kamaradoj povas

ĝustatempe aŭdi la gravajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj koni la spiriton de la kongreso, Ĉen Tianlong proponis ke li sola gardstaru ĉe la pordo de la kazerno. Kamaradoj ne konsentis tion kaj diris: "Vi jam estas tiel aĝa, ni ne povas ŝargi vin per tio." Ĉen Tianlong diris: "Por revolucio oni ne faras diferencon laŭ aĝoj. Mi volas gardstari por komunismo dum mia tuta vivo!"

Tiun tagon, pluvegis. Ĉen Tianlong, kun maŝina karabeno en la manoj, impone staris ĉe la pordo kaj serioze plenumis sentinelan taskon. La komunika raporto daŭris tutan tagon, kaj same longe falis la pluvo; kaj ankaŭ Ĉen Tianlong staris dum la tuta tempo sur la sentinela posteno. Vidinte la "sentinelon" kun grizaj haroj, oni emociite diris: "Maljuna estro de la riparejo ĉiam restas revolucia batalanto kaj imitinda modelo por ni!"

"PENEMA LUKTO EN MALFACILOJ ESTAS NIA TREZORA TRADICIO"

Ĉen Tianlong jam pasigis 37 tutajn jarojn sur la longa vojo de la proletara revolucio, 37 tutajn jarojn plenajn de penigaj luktoj kontraŭ malfaciloj, dum kiuj Ĉen Tianlong strikte sekvis Prezidanton Maŭ.

Post la Liberigo de la tuta lando, kiam Ĉen Tianlong venis de la kamparo en urbon, multe



Kamarado Ĉen Tianlong (meze) riparas ŝuojn por kadroj kaj batalantoj.



Kamarado Ĉen Tianlong korverŝe interparolas kun batalanto.

ŝanĝiĝis al li la vivkondiĉoj, sed neniam ŝanĝiĝis lia laborstilo de penema lukto en malfaciloj. Li opiniis: Por revoluciado oni devas esti pretaj al ĉia penado, se oni timas penadon, ne estas eble por ili paroli pri revolucio. Li mem, kiel veterano, kiu ricevis pli multe edukon de la Partio, devas pli konscie teni la laborstilon de penema lukto en malfaciloj kaj neniam devas permesi al si ian apartan favoron.

Laŭ la ŝtata regulo, dum oficevojaĝo Ĉen Tianlong laŭ sia rango rajtas veturi en mola litvagono. Sed en la lastaj 20 jaroj kvankam li ofte oficevojaĝis, tamen li veturis neniam en mola litvagono. Iufoje, Ĉen Tianlong iris al iu trupo kun grupo da riparistoj por plenumi riparajn taskojn. La vojaĝo estis longa. Intendanto aĉetis por li bileton de litvagono kaj donis ĝin al li en la tempo de envagoniĝo por ke li ne povu rifuzi aŭ ŝanĝi la bileton ĉe la fervoja stacio. Sed Ĉen Tianlong tuj enŝovis la bileton en la manon de nova soldato Jan Ĝinŝeng, kiu ne estis tre fortika. Tiu ne volis akcepti ĝin,

sed Ĉen Tianlong firme puŝis lin en la litvagonon kaj mem prenis la sidlokon en malmola vagono de Jan Ĝinŝeng.

Kiam li iris al alia loko por ĉeesti kunvenon, li ĉiam persiste piediris kaj neniam uzis aŭton de la riparejo, eĉ ŝvitegis dum dekkelk-lia irado. Iun varmegan somertagon, Ĉen Tianlong revenis de loko dekkelkajn liojn fora post kunveno. Ĝuste tiam, renkonte al li venis aŭtomobilo de la riparejo pro iu tasko. Vidinte sian maljunan superulon iranta, la ŝoforo bremsis la aŭtomobilon antaŭ li kaj emociite diris: “Maljuna estro, jen vi jam tiom laciĝis, lasu min veturigi vin hejmen!” Ĉen Tianlong respondis signifoplene: “Piedirado estas preferinda, la venko de la Ruĝa Armeo estas akirita ja ĝuste el irado. Kio grava estas en piedirado?” Dirinte tion, li grandpaŝe marŝis for.


Ĉen Tianlong profunde komprenas: Sub la proletara diktaturo, la revoluciulo devas disvolvi la revolucian tradicion de batalo en malfaciloj, se li volas teni sian revoluciecon en la maljunulaj jaroj

kaj revolucii por ĉiam. Kontraŭe, maldiligenteco en penso kaj komfortavido en vivo ofte estas komenciĝo de degenero por la revoluciulo. Tial, kamarado Ĉen Tianlong vivas ĉiam laŭ malalta nivelo. En la pasintaj 20 jaroj de post la veno en urbon, li dormas ĉiam sur malmola tabula lito kaj prenas manĝon saman al tiu de soldatoj. Foje kiam li transloĝiĝis, la intendanta sekcio aparte sendis al li molan liton. Vidinte ĝin, li kun helpo de sia edzino tuj reportis la liton kaj diris: “Estas pli bone, ke mi dormu sur tabula lito.”

Unu akvoretizstan tolon li uzas ĝis nun ekde la tempo de la milito kontraŭ Usono por helpi Koreion; unu ledan zonon li uzis jam 29 jarojn post plurfoja rompiĝo kaj kunkudro kaj fine li donacis ĝin al sia plej aĝa filo, kiam tiu partoprenis ĈPLA. Li diris al la filo: “Kunportante tiun ledan zonon, vi ne forgesos la pasintecon. Ne prene forgesu, ke penema lukto en malfaciloj estas nia trezora tradicio!”

SONG JING:

Elstara Komunisto Vang Guofu



Kamarado Vang Guofu

LA elstara batalanto de la proletaro komunisto Vang Guofu, kreskinta sub la nutrado de Maŭzedongpenso, dediĉis sian tutan brilan vivon al la granda revolucia afero de la proletaro. Je la 6-a de novembro, 1969, kamarado Vang Guofu mortis de malsano. En la lasta momento de sia vivo, respektoplene rigardante la portreton de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ li diris intermite al la kadroj de la komunumo kaj brigado kaj maljuna malriĉkamparano iam servinta kune kun li ĉe bienulo kiel jardungito, kiuj flegis lin ĉe lia lito: "Nepre aŭskultu la vortojn de Prezidanto Maŭ, ... kaj ĉiam bone tenu la regpotencon por la revolucio."

FEROSTA TENANTO DE LA RUĜA STANDARDO

Kamarado Vang Guofu estis estro de la revolucia gvida grupo de Dabajloŭ-produktogrupo de Ginhing-produktobrigado de Honghing-komunumo de Dahing-gubernio de Pekino.

En la jaro 1922, Vang Guofu naskiĝis en malriĉkamparana familio, kies tri generacioj servis kiel dungitaj kampuloj, en Venŝang-gubernio de Ŝandong-provinco. La dek du membroj de la familio havis nur 1.5 muojn da tero kaj devis sin vivteni tutjare per ŝelo de ulmo kaj folioj de rapoj kaj poploj. La tuta familio havis nur unu ĉifonan vatitan litkovrilon por trapasi frostan vintron. Post kiam la sango de lia patro estis komplete

eksploatita de la bienulaĉoj, li havis post sia morto nur sorgotigojn por kovri sian korpon. Vang Guofu almozetadis de sia infanaĝo kaj kiam li estis dekdu-jara, li migris al Pekino pro natura katastrofo kaj komencis servi kiel jardungito. Estas Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, kiuj savis lin el la maro de mizeroj.

Li havis klasan malamon mare profundan kaj revolucian volon ŝtale firman. Li firme kredis la vortojn de Prezidanto Maŭ: "**Nur socialismo povas savi Ĉinion.**" Laborante kiel kadro dum 17 jaroj li revoluciadis senĉese kaj brave antaŭenmarŝadis laŭ la socialisma ŝoseo montrita de Prezidanto Maŭ, kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sub sia gvido!

En la jaro 1952, Vang Guofu gvidis du malriĉkamparanajn familiojn organizi la unuan interhelpan grupon de sia distrikto, kiu plugis per homa forto kaj havis nur azeneton por tiri ĉaron.

En 1955, kune kun la aliaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj li rebatis la diablan venton de "eksiĝo de kooperativo" levita de plenumo da klasaj malamikoj kaj spontaneaj kapitalismaj fortoj, firmigis la socialisman pozicion kaj batalakiris la unuan riĉan rikolton post la kooperativigo. Kaj en tiu jaro, Vang Guofu glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Sub la ruĝa standardo, rigardante la portreton de la savanto Prezidanto Maŭ, li levis sian manon kaj ĵuris

kun varmaj larmoj: “Mi revoluciados ĝis la fino senreturte, sekvante Prezidanton Maŭ!”

De la kooperativigo al la komunumigo, por fari ĉiun paŝon antaŭen, oni devis frakasi obstaklojn. Vang Guofu gvidis la malriĉkampanojn kaj malsuperajn mezkampanojn de Dabajloŭvilaĝo brave marŝi antaŭen venkante ĉiujn obstaklojn.

En 1965, spite al forta kontraŭstaro de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj revoluciaj kadroj, la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kolportis la nigran varon de la renegato, interna spiono kaj laboristperfidulo Liu Ŝaŭki, nome “tri pliigoj kaj unu fikso” kaj ellaboris en iu produkta grupo la nigran sperton de “fikso de produkta kvoto bazita sur mastrumo de grupeto kaj fikso de ĉiupersona respondeco pri sulkoj”. La kontraŭrevolucia reviziisma kliko de Peng Ĝen de la malnova Kompartia Komitato de Pekino rigardis ĝin kiel plej altvaloran trezoron kaj tuj honoris la produktan grupon per titolo “ruĝa standardo”. En aŭtuno de tiu jaro, Vang Guofu “vizitis” tiun produktan grupon “laŭ ordono”. Ju pli li rigardis, des pli li indigniĝis. Iu grupestro iranta kune kun li demandis lin: “Kiel vi opinias pri la sperto de tiu

ĉi loko?” Vang Guofu respondis indigne: “Regresante de granda kolektivo al malgranda kaj de malgranda al familio, ĉu oni ne iras al individua mastrumo? Tio ĉi estas vojo al senelirejo, kiu nepre ne devas esti irata!”

Rimarkinte, ke Vang Guofu ignoras la nigran sperton post reveno al sia vilaĝo, la enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon de la komunumo ordonis foj-refoje, ke li iru al tiu produktogrupa kun la kadroj de sia produktogrupa por loĝado en ĝi kaj “lernado”. Vang Guofu respondis decideme: “Mi aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ, kaj volas teni la standardon de Daĝaj kaj iri ĝian vojon!” Li sendis neniun al tiu grupo.

La enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon furioze koleriĝis kaj senĉese aplikis premon al li. Sed Vang Guofu ne estis timigita kaj respondis denove per la sama firma frazo: “Mi aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ, kaj volas teni la standardon de Daĝaj kaj iri ĝian vojon!” En kunveno de la tuta grupo kun emocio Vang Guofu laŭte demandis la ĉeestantojn:

“Ĉu ni dividos la kampojn de la grupo?”

“Ne!”

Li ĉiam studas verkojn de Prezidanto Maŭ.



“Ĉu ni konsentas dividi la brutojn kaj agrikulturajn instrumentojn?”

“Ne!”

“Ĉu ni imitos ilian ekzemplon?”

“Ne!”

Vang Guofu diris decideme: “Prave vi diris. Ni nepre iros la vojon montritan de Prezidanto Maŭ!” Tion li priparolis ĉie kien li iris, tiel ke la aŭskultantoj kortuŝiĝis. La komunumanoj pene konstruis socialisman novan kamparon per siaj diligentaj manoj, sin apogante sur Maŭzedongpenso. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭdis Vang Guofu: “Li estas vere ferosta tenanto de la ruĝa standardo!”

Komenciĝis la Granda Proletara Kultura Revolucio, kaj Vang Guofu firme decidis plie hardisian ruĝan koron fidelan al Prezidanto Maŭ en la flamoj de la revolucia amasa movado kaj ĉiam bone teni la regpotencon por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. En iu profunda nokto, Vang Guofu malfermis la ruĝan libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj legis: “Nia

devo estas respondi al la popolo... kaj se estas farita iu eraro, ĝi devas esti nepre korektita — jen kion signifas respondi al la popolo.” Ju pli li legis tiujn vortojn, des pli heliĝis lia koro.

Kun senlima fideleco al Prezidanto Maŭ kaj strikte sekvante la grandan strategian dispozicion de Prezidanto Maŭ, Vang Guofu fervore petis opiniojn de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de familio al familio. Li diris al ili: “Se mi korekte faris 99 el miaj 100 farajoj en servado al la popolo, tio ja estas mia propra devo; kaj mi devas fari memkritikon, se mi faris unu el ili erare. Oni kritikis min ja por helpi min pli bone revolucii.”

La flamoj de la Granda Proletara Kultura Revolucio hardis la ruĝan koron de Vang Guofu senlime fidelan al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, tiel ke ĝi fariĝis ankoraŭ pli ruĝa.

LOĜADI EN LA “KABANO POR JARDUNGI-TOJ” KAJ REVOLUCII POR ĈIAM

Prezidanto Maŭ instruas nin: “Sen firma kaj ĝusta politika direkto, estas neeble instigi laborstilon

Por revolucii oni ja devas timi nek malfacilojn nek morton.



de penega batalo; sen laborstilo de penega batalo, estas neeble efektiviĝi firman kaj ĝustan politikan direkton.” Dum sia 17-jara laborado kiel kadro, Vang Guofu ĉiam persistis en ĝusta politika direkto kaj la labora stilo de penema luktado en malfaciloj. Karmemorante sian malnovan grupestron, la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Dabajloŭ-vilaĝo neniam forgesos lian kortuŝan agon de loĝado en la “kabano por jardungitoj” kaj daŭra revolucio.

En Dabajloŭ-vilaĝo sin trovis blanka etaĝdomo de bienulo, kiu jam disfalis antaŭ longe; nun tamen restas la “kabano por jardungitoj” troviĝanta ĉe la blanka etaĝdomo. Ĝi estas atesto de la historio de ekspluatado kaj subpremado fare de bienuloj al kamparanoj en la malnova socio. En la dudek jaroj post la Liberiĝo, Vang Guofu helpis la malriĉkampanojn kaj malsuperajn mezkampanojn konstrui novajn domojn, tamen li mem ankoraŭ loĝis en la “kabano por jardungitoj”. Li ne forgesis la mizerojn de sia klaso, firme tenis en sia memoro la sangajn suferojn kaj tutkore zorgis pri la klasfratoj kaj la revolucia afero.

Li neniam forgesis la ankoraŭ suferantajn popolojn en la mondo.



La “kabano por jardungitoj” loĝata de Vang Guofu havis murojn el nebakitaj brikoj, tegmenton el sorgotigoj kaj krudan fenestron el kelkaj interkruciĝantaj bastonoj. Ĝi larĝis nur pli ol 7 futojn, longis nur dekkelkajn futojn kaj la terlito kaj la forno okupis pli ol duonon de ĝia plankspaco. Li bonorde pendigis sur la muro portreton de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. La ruĝa suno lumigis la “kabanon por jardungitoj” interne kaj ekstere.

Vidante ke la “kabano por jardungitoj” estas tro malvasta por la ses membroj de la familio de Vang Guofu, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de la vilaĝo konsilis lin konstrui novan domon. Vang Guofu ĉiufoje respondis al la admonantoj kun rideto: “Havante iom multe da malfaciloj ni ne reviziistiĝos. Estos komforte por mi, se mi loĝos en nova domo, sed tiam mi facile forgesos la klasfratojn dum pluvo.”

En profunda somera nokto, furiozis ventpluvo kaj fulmotondro. En la “kabano por jardungitoj” de Vang Guofu gutadis senĉese enpenetrita pluvakvo tip-top-e. Ekmemorinte la klasfratojn loĝantajn en kadukaj domoj Vang Guofu tuj ellitiĝis, forlasis sian domon por iri kontroli iliajn domojn vadante en torenta pluvego. En la sekvinta mateno, respondeculoj de supera instanco venis por esplori la pluvon kaj rimarkis, ke matoj aŭ laktolo kovris ĉiujn domojn pluvulasantajn escepte de la kabano de Vang Guofu, kiu ankoraŭ enlasis pluvakvon. Efektive li ne revenis hejmen en tiu nokto, kaj apenaŭ elkrepuskiĝis, li jam gvidis komunumanojn iri en kamparon por dreni pluvakvon.

En multaj noktoj de torenta pluvego Vang Guofu tiel ĉirkaŭiradis tutnokte en la vilaĝo.

La plejparto de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Dabajloŭ-vilaĝo estis migrintoj de aliaj lokoj antaŭ la Liberiĝo pro natura katastrofo, kaj ili havis ne sulkon da tero nek kabanaĉon por sin ŝirmi. La kadukaj kabanaj por jardungitoj el nebakitaj brikoj de bienuloj, kiujn ili ricevis en la agrara reformo, povis ilin ŝirmi nek de vento nek de pluvo. Delonge Vang Guofu jam faris decidon ŝanĝi tiun fizionomion de malriĉeco. Samtempe kun disvolvado de la agrokultura kaj bestbreda produkto, li gvidis la amasojn planti dudek mil arbojn por pretigi lignon por konstrui domojn. Kaj krome, li persvadis la grupanojn forlasi la malnovan kutimon de festnado dum konstruo de domo kaj konstrui domojn per interhelpo kaj laborŝanĝo. Sekve de la senĉesa disvolviĝo de la kolektiva produkto, ĝojiga ŝanĝiĝo

okazis en Dabajloŭ-vilaĝo: novaj domoj konstruiĝis unu post alia kaj pli kaj pli malmultiĝis la kadukaj kabanoj el nebakitaj brikoj.

Vang Guofu laboris kiel estro en brikejo de la brigado du jarojn, kaj helpis multajn malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn konstrui novajn domojn. Sed li ne aĉetis eĉ unu brikon kaj neniam pensis pri konstruo de nova domo por si mem.


La familio de lia fratino, kiu estis de malnova malriĉkamparano en la vilaĝo, loĝis en tre malgranda kaj kaduka kabano el nebakitaj brikoj kaj delonge deziris konstrui novan domon. Plurfoje Vang Guofu admonis ilin: "Ne estas multaj laborfortoj en nia produktogrupa. Se vi unue konstruos domon, tiam aliaj devos prokrasti tian aranĝon. Prefere lasu aliajn tion fari antaŭ vi. Oni ja povas same revolucii loĝante en kaduka domo por ankoraŭ kelkaj jaroj." La bofrato kaj fratino akceptis lian admonon kaj prokrastis la konstruon de domo por kelkaj jaroj. Kiam lia unua filo fianĉiĝis, denove iu konsilis lin: "Nu, ĉifoje estas via vico konstrui por vi domon!" Tiam li respondis kun rideto: "Mia vico venos, post kiam ĉiuj malriĉ-

kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj havos novan domon!"

Iuvespere, maljuna malriĉkamparano Vang Juandaŭ, kiu jam enloĝis novan domon, venis en la "kabanon por jardungitoj" de Vang Guofu. Vidante, ke liaj pluraj infanoj kuŝas premante sur la malgranda terlito, li diris pretervole kun profunda simpatio: "Vi zorgas nur la aliajn, sed vi ja devas iom zorgi ankaŭ pri tiu ĉi familio. Tuj konstruu domon!" Ekpreninte libreton pri lernado de Daĝaj, Vang Guofu sidigis Vang Juandaŭ apud si kaj diris: "Prezidanto Maŭ alvokis nin lerni de Daĝaj, do ni devas bone lerni de ĝi kaj kompari unu kun alia pri fideleco al Prezidanto Maŭ kaj zorgi pri kontribuo al la ŝtato kiel la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daĝaj; bagateloj estas ĉiuj privataj aferoj, kiel ajn gravaj ili estas."

Ĝis printempo de 1969, 30 el la 31 familioj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la vilaĝo jam havis novan domon, tamen nur Vang Guofu ankoraŭ loĝis en sia malgranda "kabano por jardungitoj".

Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj unuanime iras la luman socialisman vojon.



Kiam malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj rigardis la novajn domojn en la vilaĝo, la pajlamasojn similajn al montetoj sur la draŝejo, la gregojn de grasaj porkoj en la porkbredejoj kaj la jaron post jaro multiĝantan superfluan grenon en la tenejo kaj poste la malgrandan "kabanon por jardungitoj" ankoraŭ loĝatan de Vang Guofu, ilia koro ankoraŭ pli pleniĝis de zorgo pri la maljuna grupestro. Ili diris denove al Vang Guofu: "Maljuna grupestro, vi dediĉis la tutan koron al la kolektivo kaj via koro preskaŭ rompiĝis de zorgoj pri konstruado de domoj por ni. Ĉifoje jam estas via vico konstrui domon por vi mem!" Vang Guofu respondis: "Estante kadro, oni devas tiri ĉaron sed ne veturi per ĝi, oni devas tiri la revolucion ĉaron por la tuta vivo."

SIN DEDIĈI TUTKORE AL LA KOLEKTIVO KAJ ĈIAM RESTI EN PLENA PURECO

Laborante kiel kadro dum 17 jaroj, Vang Guofu sin dediĉis tutkore al la kolektivo kaj ĉiam restis en plena pureco. Li estis kvazaŭ verda pino longe hardita en ventoj kaj pluvoj.

La enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon energie antaŭenpuŝis la kontraŭrevolu-

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj ĉiuj estas de la sama familio.



cian reviziisman linion de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, konstante logante kaj koruptante kadrojn per premioj, donacoj kaj regaloj per festenoj. Vang Guofu rezistis kontraŭ korupto kaj neniam lasis sin tuŝigi per malpuraĵo. Foje oni sendis al li fiŝon 2.5 kilogramojn pezan, li demandis: "Ĉu la komunumanoj ricevis tion?" Oni respondis: "Tio estas nur por la kadroj." Li diris indigne: "Tio ĉi signifas privilegion. La fiŝon mi ne akceptas!" Kaj li tuj resendis la fiŝon.

Iutage, Vang Guofu prenis faskon da rizpajloj por volvi la vazon en sia domo por teni nutraĵon de porkoj. Li iris al la librotenisto kaj diris al li: "Pesu ĝin kaj registru en la kontolibro!" La librotenisto ekridis kaj diris: "Ba! Kiom valoras fasko da rizpajloj por fari registron en kontlibro!" Vang Guofu diris serioze: "Eĉ herbon de la kolektivo oni ne devas preni laŭvole." Li foriris, nur post kiam li vidis, ke la librotenisto faris registron. En tiu kontlibro registriĝis ankaŭ alia ŝuldo de Vang Guofu. Antaŭtagmeze de la sepa de julio, 1968, Vang Guofu prenis korbbon da tritikaj ŝeloj de sur la draŝejo, iris al la librotenisto kaj diris same kiel antaŭe: "Pesu kaj registru en la kontlibro." La librotenisto diris: "De kie venis tiu

regulo? Ĉiuj aliaj, kiuj prenis iom da tritikaj ŝeloj, ne registrigis konton, do ankaŭ vi tion ne faru." Vang Guofu diris serioze: "Neniom da maljusta profito oni devas preni de la kolektivo!" La librotenisto fine devis fari kalkulon pri la 7.5 kilogramoj da tritikaj ŝeloj en la korbo de Vang Guofu laŭ la prezo 0.016 *yuan* kaj registris en la kontlibro ŝuldon de 0.12 *yuan*.

Se Vang Guofu vidis iun atenci la kolektivon por gajni profiton por si mem, li decideme batalis kontraŭ li. En somero de 1962, preterpasante melon-kampon de Dabajloŭ-vilaĝo, iu kadro de la produkta brigado prenis laŭvole melonon senpage por manĝi. Vang Guofu alrapidis kaj kritikis lin: "Kian ekzemplon vi donis al la komunumanoj!" La kadro diris haste: "Mi pagu, mi pagu!" Vang Guofu diris al li: "Ne temas pri pago de iom da mono, sed pri tio, ke ni kadroj devas doni modelan ekzemplon en ĉiuj aferoj!" La kadro tuj faris memkritikon ĉeloke. Vang Guofu

diris: "Unu melono estas bagatelo, sed iuj homoj malboniĝis ĝuste komence de 'bagateloj'. Por ni kadroj, eĉ fasko da herbo devas esti pagita!"

Vang Guofu estis viro kun ŝtala volo, kiu neniam plendis pro malfaciloj kaj neniam etendis manon por peti helpon de la produkta grupo kaj neniam prunteprenis monon. Dum lia malsanado, la produkta brigado rimarkis ke lia familio estas en malfacilo kaj sendis monhelpon de 50 *yuan* al li. La akraj doloroj de la malsano ne povis ĝemigi aŭ larmigi tiun revolucionan batalanton, sed kiam li vidis la monon alsenditan de siaj klasfratoj, la maldolĉoj en la malnova socio kaj la feliĉo en la nova socio kune svarmis en lian koron kaj li diris kun larmoj en la okuloj: "Nun niaj tagoj jam estas multe pli facilaj ol en la malnova socio, ja neniam malfacilon ni havas. La mono en la brigado estas sango kaj ŝvitoj de la komunumanoj kaj ĉiu groŝo da ĝi devas esti uzata por disvolvi la kolektivon produktadon." Li insiste remetis la 50 *yuan* en la manojn de la alportinto ne akceptinte la monhelpon.

La vastaj amasoj de la komunumanoj laŭdis lin: "Laborante kiel kadro, Guofu ne prenis solan

herbon de la kolektivo senpage, nek prenis iomete da greno maldece de la kolektivo, nek maldece elspezis solan groŝon de la kolektivo. En faro de peza laboro, ĉiufoje li estis la unua; en divido de objektoj, ĉiufoje li prenis la lastan porcion. Li vere estas modelo por ni."

Vang Guofu fidele laboris por la revolucio. Li gvidis la komunumanojn batali kontraŭ la naturo, reformi alkalajn kampojn, turni neirigaciajn kampojn en rizkampojn kaj terkulturi laŭ scienca metodo, kaj samtempe energie bredi porkojn. En la pasinteco, ĉe Dabajloŭ-vilaĝo "la kampoj malfekundis, mizer' ne mankis, grenplantoj malabundis, pluvakv' inundis, kaj alkal' surkampe blankis". Sed nun tie je porkoj plenas la staloj, aromas rizplantaĵoj kaj abunde kreskas arbaroj. La pomua produktokvanto de greno kreskis de kelkdek ĝinoj en la komenca periodo post la Liberigo ĝis 725 ĝinoj en 1969. Ĉiu familio povas ricevi meznombro pli ol dek mil ĝinojn da greno kaj ĉiu homo meznombro pli ol du mil ĝinojn. Nun kaj la grupo kaj ĉiu familio jam havas grenon en rezervo. La tuta grupo nun impetas antaŭen flugrapide laŭ la luma socialisma ŝoseo montrita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Por lerni de kamarado Vang Guofu en agoj, la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de la Dabajloŭ-a Produkta Grupo levas novan tajdon de produktado kaj firme decidis gajni unuajarajn riĉrikolton de la sepdekaj jaroj.



Lernantoj de la elementa lernejo de la Ĝinĝing-a Produkta Brigado fondita de Vang Guofu serioze studas la “tri popularajn artikolojn”.



“MI STUDOS VERKOJN DE PREZIDANTO MAŬ, SE NUR MI ANKORAŬ HAVOS SPIRON”

“Mi studos verkojn de Prezidanto Maŭ kaj defendos Prezidanton Maŭ, se nur mi ankoraŭ havos spiron!” Kun profunda proletara amo al Prezidanto Maŭ, Vang Guofu efektivigis sian brilan ĵuron per obstina batalvolo.

Post la publikigo de la plej nova instrukcio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **“En la kamparo, la lernejoj devas esti administrataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj — la plej fidinda aliancano de la laborista klaso”**, Vang Guofu fervore ĝin propagandis kaj decideme plenumis en praktiko. Kune kun aliaj komunumanoj li faligis per segilo la grandan salikon ĉe la vilaĝfino, faris el ĝi simplajn tablojn kaj masonis benkojn el nebakitaj brikoj. La elementa lernejo de Dabajloŭ-vilaĝo mastrumata de la komunumanoj naskiĝis en malalta kabano el tero! Vang Guofu surpaŝis la podion kaj donis la unuan lecionon: Neniam forgesu klasan batalon. Li rakontis al la infanoj pri la maldolĉoj de la malnova socio, rememorante pri sia tragika vivo de almozpetano kaj jardungito en sia knabeco kaj pripensis pri la dolĉoj de la nova socio. Li diris emocie: “Por tiu ĉi feliĉo, ke vi povas lerni sen eliro de la vilaĝo, vi devas

danki al Prezidanto Maŭ. Vi devas bone studi la librojn de Prezidanto Maŭ en tiu ĉi tera kabano kaj transdoni Maŭzedongpenson de generacio al generacio!”

En printempo de 1969, kiam li sendis sian unuan filon Ĝengkiaŭ aliĝi al la popola armeo, li invitis al si siajn fratinojn, kiuj migradis antaŭ pli ol 30 jaroj pro katastrofo, preparis krudan manĝaĵon el brano, rafan-folioj k.s. por kune memori pri la maldolĉoj en la malnova socio kaj pensi pri la dolĉoj en la nova socio. Li diris al Ĝengkiaŭ: “Prenu vian notlibron kaj notu diktaĵon de via patro!” Kun larmoj en la okuloj, Vang Guofu rakontis pri klasaj mizeroj kaj sangaj suferoj. Notante pri tio, Ĝengkiaŭ, kiu naskiĝis en la nova socio kaj kreskas sub la ruĝa standardo, viŝadis siajn larmojn. En la malluma malnova socio, “homojn manĝis la tigroj sur la orienta monto kaj same tiel ankaŭ la tigroj sur la okcidenta monto.” Sennombraj malriĉuloj penlaboradis tutjare kun malplena stomako rompante al si tendenojn kaj ostojn kaj devis forvendi siajn infanojn kaj formigri pro katastrofoj. Kiam Vang Guofu servis kiel jardungito, li laboregis kiel ŝarĝbruto kaj prenis manĝon por porko kaj hundo. Li unuiĝis kun la malriĉaj kunuloj kaj malcedeme batalis kontraŭ kulakoj kondamnante ilin pro ilia ekspluatado, por akiri la rajton de ekzistado. En iu neĝtago,

kulako forpelis lin el sia domo. Ne havante regpotencon en siaj manoj, kie la malriĉuloj povis trovi justan juĝon? De tiam, li devis malfacile sin vivteni "preparante salpetron en printempo, kolektante herbon en somero, kaptante fiŝojn en aŭtuno, migrante en vintro kaj portante tutjare sian ĉifonan vatitan veston". Estas Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, kiuj gvidis la laborantan popolon batalakiri per pafiloj la regpotencon kaj fine liberigis lin. Li foje kaj refoje admonis al sia filo: "Bone aŭskultu la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj neniam forgesu klasbatalon. Ni defendos Prezidanton Maŭ, nur se ni ankoraŭ havos spiron. Firme tenu la pafilon kaj konduku batalon kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj la reakciuloj ĝis la fino!"

Je la 26-a de julio de tiu jaro, Vang Guofu iris laŭ invito al la mezlernejo Ginhing por paroli pri sia komprenaĵo pri la teorio de Prezidanto Maŭ pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo. Dum sia parolado, subite li ekvomis. La instruistoj kaj lernantoj maltrankvile demandis lin, kian malsanon li suferas, kaj volis sendi lin al hospitalo. Li diris kun rideto: "Ne gravas. Mia stomako ne estas en ordo, mi tamen povas tion elteni." Li vomis fojon post fojo, kaj daŭrigis sian paroladon kun mirinda persistemo. Ja neniu imagis al si, ke stomaka kancero estis minacanta la vivon de tiu elstara batalanto de la proletaro!

La 4-an de aŭgusto, Vang Guofu ricevis sciigon de la brigado, ke li iru aŭskulti transdiron de la plej nova batala ordono de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro. Kiam li estis forlasanta sian domon por iri al la oficejo de la brigado malproksima je kelkaj lioj, lia okjara filineto diris al li tirante lian baskon: "Paĉjo, vi nenion manĝis de tri tagoj, mi ne lasas vin iri!" En tiuj tri tagoj lia stomako doloris al li eksterordinare kaj li elvomis ĉion, kion li manĝis. Sed kiel kompartiano, li povis vivi kun malplena stomako, tamen neniam povas vivi sen la spirita nutraĵo de Maŭzedongpenso. Li diris karesante la kapon de sia filineto: "Bona infano mia, aŭskultu min kaj tuj iru al la lernejo. Via paĉjo iras por aŭskulti la voĉon de Prezidanto Maŭ." Premante sian stomakon kaj ŝvitante tutkape, Vang Guofu enpaŝis la kunvenejon ŝanceliĝante. Tio surprizis la kamaradojn kaj ĉiuj admonis lin kun kora zorgo, ke li reiru hejmen por ripozo. Li diris ridetante kaj kapskuante: "Mi volas aŭskulti la voĉon de Prezidanto Maŭ!" Persiste li eltenis la akregan doloron ĝis la fino de la kunveno. Sur la vojo de

hejmeveno li svenis. En tiu tago oni portis lin en hospitalon. Kiam li rekonsciiĝis kaj vidis la klasfratojn alvenintajn por lin vidi, la unua frazo dirita de li estis: "Ĉu konkretaj aranĝoj jam estas faritaj por efektivigo de la plej nova batala ordono de Prezidanto Maŭ?"

Apenaŭ Vang Guofu povis ellitiĝi post operacio, li jam malfacile paŝis al fenestro sin apogante per brako sur muro. Rigardante vastan ore flavan rizkampon en malproksimo, li petis la kuraciston: "Bonvolu diri al mia vilaĝo, ke oni portu min hejmen per veturilo!" La kuracisto diris: "Vi ankoraŭ ne resaniĝis kaj graviĝos via malsano kaŭze de trolaciĝo pro tia moviĝo." Li diris: "Mi ne povas fari fizikan laboron, tamen mi povos iradi tien kaj tien por rigardi kaj helpi la aliajn per konsiloj." La kuracisto firme rifuzis lian peton por elhospitaliĝo.

En la hospitalo, Vang Guofu studis kaj propagandis la "tri popularajn artikolojn" ĉiutage. Sub lia propono la malsanuloj funkciigis studrondon de Maŭzedongpenso, kaj ili ĉiuj elektis lin kiel ĝian estron. Li iris de malsanula ĉambro al la alia sinapogante per mano sur muro por organizi ĉiujn en studo.

Morto minacis kamaradon Vang Guofu kaj ŝvitgutoj kun la grandeco de sojo fluadis senĉese de sur lia malgrasa vizaĝo. Li kunpremis siajn dentojn kaj ellasis neniun ĝemon. Kuracisto volis mildigi lian doloron per medikamento, sed li diris per malforta voĉo: "Tion ne. Lasu la valoran medikamenton al la klasfratoj!" De tempo al tempo li malfermis la brilajn "tri popularajn artikolojn" per la tremantaj manoj kaj kantis la kanton kun vortoj de Prezidanto Maŭ kiel teksto: "**Faru firman decidon, timu nenian oferon...**"

"La maljuna grupestro mortas!" Kiam tiu informo venis al Dabajloŭ-vilaĝo, tiel maltrankviliĝis la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, ke ili ne sciis kion fari. Multaj rapidis al la hospitalo por vidi la maljunan grupestron.

Eltenante la akran doloron kaŭzitan de la stomaka kancero, Vang Guofu, same kiel kutime, tuŝis nenion alian ol aferon de la produktogrupo je sia ekparolo. Jam estis tre malfacile por li eldiri ĉiun vorton, tamen li ankoraŭ zorge admonis, ke la grupanoj bone bredu la porkojn de la grupo kaj zorge rikoltu la rizon de la grupo.

Vang Guofu ja ne mortis, lia revolucia spirito vivos por eterne!

Viglecplena Partia Filio

La partia filio de Cencun-brigado en antaŭurbo de Kantono forte tenas ideologian revoluciigon de la gvida grupo, gvidas la vastajn partianojn kaj amasojn firme iri sur la socialisma vojo, solidigas kaj disvolvas la socialismajn poziciojn en kamparo. Ĝi senĉese kreskas kaj plifortiĝas en la bataloj inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj. Hardita kaj provita en la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj precipe post la ordigo kaj konstruo de la Partio, la partia organizo fariĝis ankoraŭ pli pura ideologie kaj organize kaj ankoraŭ pli plena de batalforto kaj vigleco.

Profunde kaj persiste disvolvante revolucion amasan kritikon kun klasbatalo kiel gvidprincipo, la partia filio organizis pli ol 200 kritikajn kunvenojn dum la lasta pli ol duonjaro por forte kritiki la teorion de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki pri “estingiĝo de klasbatalo” kaj liajn aliajn kapitalismajn nigrajn varojn, kaj tiel levis la konscion de la vastaj partianoj kaj amasoj pri batalo inter klasoj kaj linioj.

Sub la gvido de la granda principo **“teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito”**, la partia filio gvidis la vastajn partianojn kaj amasojn batali kontraŭ la naturo, multe entrepreni akvoutiligajn konstruojn. Ili ebenigis pli ol 1,200 muojn da agroj, kulturebligis pli ol 1,600 muojn da virga tero, kaj konstruis pli ol 95% da agroj en kampojn stabile altproduktajn tiel en sekeco kiel en tropluveco, krome, ili fondis agrikulturan maŝinan stacion, apogante sin sur la kolektiva ekonomio kaj propraj fortoj, tiel ke la natura fizionomio de Cencun ĝisfunde ŝanĝiĝis.

La partia filio firme tenas klasbatalon kaj instigas la partianojn stari unuavice en klasbatalo. Jen komunisto Huang Ĝiceng forte kritikas en iu kunveno la teorion de Liu Ŝaŭki pri “estingiĝo de klasbatalo” kaj malkovras la krimojn de klasaj malamikoj.





La sekretario de la partia filio He Ĝou (la unua de dekstre) kaj traktoroj



Luo Hiaüfang (meze), membro de la partia filio, kulturas plantidojn kune kun kamaradoj de la scienca eksperimenta grupo.

La vicsekretario de la partia filio Pan Su ofte vizitas komunumanojn por pride-mandi ilian vivon.



Kun alta singardemo oni peneme ekzercas sin milite por ekstermi malamikojn kaj defendi la socialis-man patrolandon.





Sub la gvido de la partia filio, oni fondis propran agrikulturan maŝinan stacion, disvolvante la revolucion spiriton "sinapogi sur propraj fortoj, peneme lukti en malfaciloj".



La Socialisma Nova Cencun

EN antaŭurbo de Kantono troviĝas Cencun-a Produkta Brigado de Ŝahe-komunumo. Sub la gvido de la Partio, la popolanoj de Cencun suriris la socialisman vojon kaj ankaŭ ĝia produkto senĉese progresas kun disvolviĝo de akvoutiliga konstruo kaj leviĝo de kultivaj teknikoj. Antaŭ la kooperado ĝia pomua produktokvanto de rizo estis nur 200-300 ĝinoj, nun ĝi jam superis 1,000 ĝinojn. Kaj la pomua produktokvanto de legomo superis 10,000 ĝinojn. En Cencun-brigado estis 16 kalvaj montoj grandaj kaj malgrandaj. En la lastaj dekkelkaj jaroj, la popolanoj de Cencun plantis sur tiuj montoj pli ol 3,000 muojn da arboj kaj kulturebligis pli ol 1,600 muojn da virga tero, sur kiuj ili kulturis grenajn kaj oleajn plantojn kaj fruktarbojn. Dank' al tio la kolektivaj enspezoj multe kreskis, kaj ili faras ĉiam pli grandan kontribuon al la ŝtato.

En la lastaj jaroj, la komuna akumulado de la brigado oble kreskis kompare kun tiu antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio. La kresko de la komuna akumulado levis gradon de ĝia agrikultura mekanikigo kaj akcelis plian disvolviĝon de ĝia agrikultura produkto. La brigado nun havas du kamionojn kaj 13 diversstipajn traktorojn, krome, ankaŭ pumpilojn, elektrajn draŝilojn, olepretilojn kaj aliajn. Surbaze de la produkta disvolviĝo, la

vivnivelo de la komunumanoj leviĝis paŝon post paŝo. Ekde la vintro de 1967, ĝiaj membroj konstruis novajn domojn kun pli ol 300 ĉambroj. Nemalmultaj komunumanoj posedas biciklon, radioricevilon, kudromaŝinon kaj aliajn. Ankaŭ la kultura afero kaj bonstatiga servo multe disvolviĝis. La brigado starigis mezlernejon, sanitarejon, infanvartejojn kaj infanĝardenojn. Krome, la brigado ankoraŭ starigis grenan prilaborejon, lignosegejon, sterkan fabrikon kaj aliajn malgrandajn fabrikojn por servi al la agrikultura produkto kaj ĉiutaga vivo.

La baza kaŭzo de la ŝanĝiĝo de Cencun-brigado kuŝas en tio, ke ĝi havas gvidan grupon kun alta revolucia spirito. En la lastaj dekkelkaj jaroj, la partia filio de la brigado gvidis la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn firme iri la socialisman vojon.

En la jaro 1958, sub inspiro de la ĝenerala linio de la Partio, la partia filio de Cencun-brigado gvidis la amasojn ellabori "15-jaran planon" por konstrui la lokon. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Cencun ĉiuj prenis tiun planon kiel celon de sia klopodo. La "15-jara plano" jam estas ĝenerale efektiva en la tempdaŭro de pli ol 11 jaroj ekde tiam ĝis nun. Oni ĝoje diris: "Cencun tute aliĝis."

“Mi nepre ŝanĝos la fizionomion de Cencun, eĉ se mi devos oferi por tio mian vivon!” Jen estas la fera ĵuro de la sekretario de la partia filio kamarado He Ĝoŭ, kaj ankaŭ la komuna volo de la tuta partia filio kaj la malriĉkamparanoj kaj mal-superaĵ mezkamparanoj. Sub la gvido de la partia filio la popoloj de Cencun multe entreprenis en akvoutiliga konstruo, ebenigo de la agroj kaj kulturebligado de virgaj montoj. Nun pli ol 95 procentoj de la tuta agraro de la brigado estas imunigitaj kontraŭ sekeco kaj pluvinado.

En la lastaj dekelaj jaroj, la popoloj de Cencun konstruis kaj riparis 7 akvokonservejojn, ebenigis pli ol 1,200 muojn da tero kaj kulturebligis pli ol 1,600 muojn da agroj sur virgaj montoj, kaj efektivigis agrikulturan mekanikigon. Ili profunde komprenas, ke batalo de la homaro kontraŭ la naturo ne havas finon kaj Cencun faris nur la unuan paŝon en ŝanĝado de sia fizionomio. La partia filio kaj la brigada revolucia komitato decidis realigi en 1970 plenanpleksan antaŭensaltegon samtempe en agrikulturo, forstado, paŝtado, flank-okupoj kaj fiŝado. Irigaciado per memflua akvo estos efektivigita al la kampoj sur la 16 montetoj per elhako kaj konstruo de kanaletoj, kaj paŝtejoj estos starigitaj sur la montoj por bredi bovojn kaj kaprojn...

Cencun-brigado venke marŝas antaŭen en la bataloj kaj la socialisma konscio de ĝiaj komunumanoj leviĝas senĉese. En la rilatoj inter la ŝtato kaj la kolektivo, ili memkonscie metas intereson de la ŝtato en la unuan lokon. Antaŭvespere de la Maja Festo, 1969, Dongĉuan-legomvendejo de Kantono bezonis kapsikojn por liveri al konsumantoj kaj informis tion al Cencun-brigado. Pro longtempa malalta temperaturo kaj koto vetero en frua printempo, la kapsiko tiam estis ankoraŭ ne plene matura. Krome, ĝi kreskis plej rapide en tiuj tagoj. Se oni pli frue rikoltos ĝin, tio influos ĝian produktokvanton kaj la enspezon de la brigado. Sed la kadroj kaj komunumanoj de Cencun diris: “Ni kulturas por la revolucio kaj servas al la popolo, ia malprofito estas nemenciinda por ni!” Ili tuj rikoltis 6,000 ĝinojn da kapsiko kaj liveris ilin al la vendejo. Tio profunde kortuŝis la laboristojn kaj oficistojn de la vendejo.

Nun, ĉiutaga studo de verkoj de Prezidanto Maŭ fariĝis sistemo en kiu konscie persistas la cencun-anoj, kaj la brilaj “tri popularaj artikoloj” estas sekvataj de komunumanoj kiel sentencoj. Kaj avangardaj personoj kaj bonaj agoj aperas sinsekve. Sub la brila lumo de Maŭzedongpenso Cencun grandpaŝe marŝas antaŭen sur la socialisma vojo.



La unua generacio de traktoristoj de Cencun

Bona “Subplotonestro” en la Revolucia Komitato

— Pri kompartiano Ding Juangong

POST kiam kamarado Ding Juangong, politika vickomisaro de iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, fariĝis estro de la revolucia komitato de Benhi-gubernio, li helpis en ideologio la aliajn membrojn de la revolucia komitato kaj donis modelan ekzemplon al ili en agado, kun kora deziro konstrui la revolucion komitaton en firman batalan komandejon, kaj la kamaradoj laŭde nomis lin bona “subplotonestro” en la revolucia komitato.

I

Firme tenante en sia koro la instruon de Prezidanto Maŭ “**Daŭrigantoj de la afero de proletara revolucio naskiĝas en amasaj luktoj kaj kreskas hardante sin en grandaj revoluciaj ŝtormoj**”, kamarado Ding Juangong konscie kondukis la membrojn de la revolucia komitato en ardan klasbatalon por ricevi hardadon kaj provadon.

En aŭtuno de 1969, la revolucia komitato de la gubernio rimarkis, ke la batalo, kritiko kaj reformo en iuj unuoj ne povas iri glate pro la komplikeco de klasbatalo. Iuj kamaradoj proponis, ke oni sendu al tiuj unuoj kamaradojn kun klasbatala sperto por doni helpon. Ding Juangong tamen diris: “Akra klasbatalo estas bona klasĉambro por hardi gvidan grupon kaj ni devas preni la solvodon de la malfacilaj problemoj en tiuj unuoj kiel ‘ekzercadon’ por kulturado de kadroj. Mi proponas sendi novajn kadrojn.” Ankaŭ aliaj kamaradoj aprobis lian opinionon.

Sekve, propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso el tri junaj kadroj de la revolucia komitato kaj pli ol 20 oficistoj estis organizitaj kaj senditaj al tiuj unuoj. Iuj kamaradoj, kiuj unuafoje prenis sur sin tiel pezan taskon, timis ke ili ne povos bone ĝin plenumi. Kamarado Ding Juangong kuraĝigis ilin: “Se nur ni agos laŭ Maŭzedongpenso en

klasbatalo, ni do havos klaran direkton, povos unuigi kun la vastaj revoluciaj amasoj, povos venki ĉiajn malfacilojn, povos pliapaŝe firmigi la novnaskitan revolucion regpotencon kaj certe povos gajni venkon!” Liaj vortoj plenigis ĉiujn per entuziasmo.

Kaj krome, kamarado Ding Juangong persone gvidis parton de la membroj de la revolucia komitato iri al Hiapu-brigado, kie la klasbatalo estis kom-

Kamarado Ding Juangong gvidas oficejajn kadrojn profundiĝi inter la amasojn.





Kamarado Ding Juangong kaj kamarado Ju Fenggiu (la dua de dekstre), aktivulo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso en Benghi, gaje interŝanĝas siajn komprenaĵojn en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.

plika, por propagandi la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj teni la revolucion kaj stimuli la produktadon kune kun la komunumanoj.

Tiam, Ding Juangong febris je alta grado pro gripo. Sed li tute forgesis pri sia malsano. Iu-vespere, Ding Juangong interkonsiliĝis kun la aliaj pri klasbatalo. Estis jam tre malfrue kaj li tusadis terure. Kamaradoj admonis, ke li enlitiĝu iom frue por ripozo, sed li persistis daŭre ĝis profunda nokto kiel kutime.

Dank' al helpo de kamarado Ding Juangong kaj post la hardado tra la ŝtormo de klasbatalo, la membroj de la gvida grupo havas jam pli klaran direkton kaj pli firman starpunkton. Ili ĉiam staras sur la plejfronto de klasbatalo kaj forte antaŭenpuŝas la disvolviĝon de la movado de batalo, kritiko kaj reformo de la gubernio.

II

Ding Juangong ofte diris al la kamaradoj de la revolucia komitato: "En klasbatalo kaj produkta batalo, la gvida grupo ja devas sturmi antaŭ la aliaj!"

En julio de 1969, kelkfoje pluvegis en sinsekvo en Benhi-gubernio, la monttorentoj subite ŝveligis la riverojn kaj serioze minacis la vivon kaj havaĵojn de la popolo. En tiu grava tempo, kamarado Ding Juangong pasigis sennombrajn maldormajn noktojn, kaj aperis kie estis malfaciloj kaj plej granda danĝero.

Foje post torenta pluvego Ding Juangong informiĝis, ke riverdigo en la malsupra parto de Tajzi-rivero estas breĉita de inundo, kaj tuj iris al la breĉita parto. Iu kamarado de la revolucia komitato de la gubernio vidis, ke lia vaksa vizaĝo ŝvitas per dikaj gutoj, kaj ekmemoris ke li estis grave vundita dum milito, foje kaj refoje admonis lin: "Maljuna Ding, ne forta estas via sano, do vi zorgu pri komando en oficejo kaj lasu nin iri!" Ding Juangong diris firmvole: "Gvidanto devas sturmi antaŭ ĉiuj, kiam la amasoj lin plej bezonas. Kiel mi povas zorgi nur pri mia sano sed ne pri la intereso de la popolamasoj!"

Sekve ili rapidis al la loko de danĝero malgraŭ fulmotondro kaj kotaj montvojetoj kaj tuj grimpis kune kun amasoj sur krutaĵon, rulis ŝtonojn,



Kamarado Ding Juangong bonvenigas albanajn vizitantojn.

masonis digon starante en akvo, forgesante preni manĝon. Ilia ago fortege stimulis la vastajn amasojn, kaj post streĉa batalado ili finfine venkis la inundon kaj eldanĝerigis multajn vilaĝojn kaj kampojn.

Nelonge post la venko super la inundo, iuj produktaj brigadoj renkontis seriozan plagon de fiinsektoj. Tra la drata disaŭdiga sistemo, Ding Juangong enradikigis en la koron de la amasoj la brilajn instruojn de Prezidanto Maŭ **“Sinpreparu kontraŭ milito, sinpreparu kontraŭ naturaj katastrofoj, faru ĉion por la popolo”**, **“Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”**. La instruoj multe altigis la memfidon de la komunumanoj en venko de la fiinsekta plago.

Kunportante blovaspergilojn surdorse, maljuna Ding kaj kamaradoj de la revolucia komitato venis al la kampoj por gvidi komunumanojn ekstermi insektojn. La modela ago de la antaŭirantoj estas sensona ordono kaj la agado de la membroj de la revolucia komitato stimulis la vastajn revolucionajn amasojn. Post batalado en kelkaj sinsekvaj

diurnoj, ili fine elsavis la baldaŭ maturiĝontajn grenplantojn de la brigadoj.

III

Benhi-gubernio impetadas antaŭen. Antaŭ venkoj, ĉe kelkaj el la membroj de la revolucia komitato burĝoniĝis fiero kaj memkontentiĝo. Tion rimarkinte, Ding Juangong tre maltrankviliĝis. Ĉe liaj oreloj eksonis la intima instruo de Prezidanto Maŭ **“Ĉinio devas fari relative grandan kontribuon al la homaro”**, kaj en lia cerbo aperis emocia sceno:

Antaŭ nelonge, nombro da fremdlandaj amikoj vizitis Gianĉangpu-brigadon de Benhi-gubernio. Ĉe sia adiaŭo, iu kunbatalanto sur plejfronto de opono kontraŭ imperiismo kaj reviziismo diris firme prenante la manojn de Ding Juangong: **“Kamarado! Viaj atingoj en konstruado estas plej bona subteno al la monda revolucio.”**

Ding Juangong pensis: Kvankam Benhi multe progresis ol antaŭe, tamen en komparo kun la instruo de Prezidanto Maŭ kaj la espero de la mondaj popoloj ĝi faris nur la unuan paŝon en sia dekmil-lia longa marŝo!

Maŭ Zedong

Popoloj de la Tuta Mondo, Unuiĝu kaj Venku la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn!

(La 20-an de majo, 1970)

12 pĝ. 12.8×9 cm. en broŝuro

Eldonis: La Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

*Distribuas: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj),
P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio*

En la antaŭtago de Printempa Festo, Ding Juangong gvidis la membrojn de la revolucia komitato marŝi kun alta spirito, portante tornistran surdorse, sur la zigzaga montvoĵeto iam irita de gerlitaĉmento batalanta kontraŭ japanaj agresantoj. Tio estis originala kurso de Maŭzedongpenso kaj ankaŭ "longmarŝa taĉmento" por daŭra revoluciado. Ili iris en domojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por preni kune kun ili amarmemorigan manĝon, rememoris la malfacilan procedon de depreno de potenco antaŭ tomboj de revoluciaj martiroj, foje kaj refoje studis la "tri popularajn artikolojn", petis malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn paroli pri sia kompreno en viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj pripensis kompare kun sia praktiko, kiel servi pli bone al la popolo kaj kiel fari pli grandan kontribuon al la monda revolucio.

Dum tiu kursa aktivado, ili ricevis vivecan edukon pri daŭra revoluciado. La kamaradoj interligis ĉiun el siaj laboroj kun la malproksima revolucia celo. Ili diris: "Ni ĉiam batalos senĉese, se nur la proletara revolucio tion bezonos."

Kamarado Ding Juangong ĉiam zorge edifas kaj stimulas la membrojn de la revolucia komitato per sia modela ago de penema lukto en malfaciloj, por ke ili energie kaj vigle faru revolucion. Irante en la kamparon, li malofte uzis veturilojn kaj ĉiam kunportis kun si nenion krom tornistro kaj produkta instrumento. Li partoprenas fizikan laboron ĉie kien li alvenas kaj kamprando servis por li kiel oficejo. Li diris kun profunda kompreno el sia propra sperto: "Oni povas havi saman penson kun la amasoj, nur se oni laboras kune kun ili."

La modelaj agoj de kamarado Ding Juangong movis la ideologian revoluciigon de la gvida grupo de la revolucia komitato kaj ĉiuj ĝiaj membroj alkiutimiĝis al la stilo de penema lukto en malfaciloj. Escepte de du membroj de la konstanta komitato deĵorantaj en la oficejo, ĉiuj aliaj membroj longe laboras en bazaj unuoj por bone teni la laborojn en tiu nivelo. La ĉefaj gvidaj membroj de la revolucia komitato trairis la produktajn brigadojn de la tuta gubernio. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris: "La kadroj en la nuna revolucia komitato estas same tiaj kiaj dum la agrara reformo, kaj ni estas tute konfidemaj al ili!"

Kvin Dokumentoj de Prezidanto Maŭ Zedong pri Literaturo kaj Arto

(en Esperanto)

Enhavo

Letero Skribita al la Jan-an-a Pekin-opera Teatro post
Rigardo de *Premite al Liangŝan-monto por Ribeli*

Donu Seriozan Atenton al la Diskutado pri la Filmo
La Vivo de Vu Hjun

Letero pri la Problemo de Studo pri la *Songô de Buduaro*

Du Instrukciaj Notoj pri Literaturo kaj Arto

I. Instrukcia Noto de la 12-a de Decembro 1963

II. Instrukcia Noto de la 27-a de Junio 1964

16 pĝ.

9.5 x 14.5 cm.

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas la Libro servo de la Ĉina Esperanto-Ligo
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Nia Familia Kurso de Maŭzedongpenso

MI estas membro de la komitato de la partia filio de Pejĝing-brigado de Deng-gubernio, Henan-provinco, kaj ĉiam laboradis en kamparo. Vidinte ke mi maljuniĝis en la lastaj jaroj, mia edzo timis ke la revolucia laboro estas tro peniga por mi kaj diris, ke mi forlasu la postenon kaj okupiĝu pri dommastrumado. En la komenco, mi opiniis, ke tio estas lia zorgo pri mi. Sed mia bopatrino firme opoziciis lian opinion kaj diris, ke mi daŭrigu mian laboron. Tiuj du kontraŭaj opinioj longe ondadis en mia cerbo.

La 1-an de aprilo, 1969, venis al ni la ĝojiga informo pri la venka inaŭguro de la Naŭa Kongreso de la Partio. Stimulate de tiu eksterordinare ĝojiga informo, mi iris al ĉiuj grupoj tiunokte malgraŭ pluvo por sciigi tion al la komunumanoj kaj revenis al la hejmo nur en profunda nokto. Kiam mia edzo vidis, ke mia korpo estas malsekigita kaj tramakulita de koto, li denove admonis min: "Vi jam penadis en koto kaj akvo pli ol dudek jarojn kaj fariĝis tiel aĝa. Por kio ankoraŭ tiel peni? Prefere forlasu la postenon!" Mi pensis, ke mia edzo eraris, ke li diris tion okaze de la eksterordinare ĝojiga afero. Tiu okazintaĵo profunde edukis min kaj vere konigis min pri tio, ke estas grave okupi la familian pozicion per Maŭzedongpenso, kaj mi decidis fondi familian kurson de Maŭzedongpenso.

Je la 24-a de aprilo, 1969, t. e. la ĝojiga tago de venka fermiĝo de la Naŭa Kongreso, nia familia kurso stariĝis. Ni serioze studis la politikan raporton de Vicprezidanto Lin kaj fragmenton de la nova statuto de la Partio: "La fundamenta programo de la Komunista Partio de Ĉinio estas renversi ĝisfunde la burĝaron kaj ĉiujn aliajn ekspluatajn klasojn, anstataŭigi la burĝaran diktaturon per la proletara diktaturo kaj venki kapitalismon per socialismo. La fina celo de la Partio estas realigi komunismon." En komparo de nia penso kun la nova statuto de la Partio, ni disvolvis diskutadon pri la demando

"por kio revolucii". Aŭdinte la eraran diron de sia filo, mia bopatrino rememoris la maldolĉojn en la malnova socio kaj tre malĝojiĝis. Ŝi diris: "En la malnova socio, servante al bienuloj kiel dungitoj ni laboregis kiel ŝarĝbrutoj, sed ricevis nur manĝaĵon el brano kaj legomo kaj terure suferis de ekspluatado. Nun ni estas liberigitaj dank' al la gvido de Prezidanto Maŭ. Ni laboras nek por famiĝo, nek por profito, sed nur por tio, ke la laboranta popolo de la tuta mondo ne plu suferu de ekspluato, nur por realigi komunismon. Por tio, mi instigis Gujĝi partopreni revolucion laboron en 1948. En 1950, mia tria filo Pejĝun estis milicano kaj oferis sian vivon en subtenado al la fronto. Mi opinias, ke li mortis por revolucio kaj lia morto estas glora. En 1950, en la komenco de la milito kontraŭ la usona agreso por helpi Koreion, miaj kvara kaj kvina filoj aliĝis al la Ĉinaj Popolaj Volontuloj. Kiam bandito Ĉiang Kajŝek kriaĉis ke li komencos atakon kontraŭ la kontinento, mi sendis mian sesan filon por partopreni la Popolan Liberigan Armeon. Ni ne devas forgesi la maldolĉojn en la malnova socio kaj la suferantajn popolojn en la mondo, kiam ni mem ĝuas feliĉan vivon." Ĉiuj vortoj de la bopatrino tuŝis mian koron. La travivaĵoj en la malnova socio subite amase venis en mian cerbon. Mi fariĝis infan-fianĉino de iu alia familio kiam mi estis nur ses-jara kaj multege suferis de subpremo. Post la Liberiĝo, mi fariĝis mastro de la ŝtato kaj aliĝis al la Partio. Nun mi kaj mia edzo tamen ne vidis la gravecon de tenado de regpotenco kaj naskiĝis al mi la erara deziro forlasi la revolucion laboron, mia konscio de daŭra revolucio estas eĉ malpli alta ol tiu de la bopatrino. En la kurso, mi faris seriozan memkritikon kaj firme decidis pene lukti por komunismo dum la tuta vivo.

La rakonto de mia bopatrino pri la suferoj en la malnova socio profunde edukis mian edzon. Li diris emocie: "Maldolĉon en la malnova socio mi suferis pli multe ol ĉiuj miaj fratoj, sed kon-



PRODUKTADO DE MALPEZA KALCIA KARBONATO PER ELUZITA LIKVAĴO

Utiligante la grandan kvanton da eluzita likvaĵo en produktado, la laboristoj de la laborejo de kaŭstika sodo de la Dalian-a Kemia Fabriko en Liaŭning-provinco sukcese fabrikis kemian kaj industriajn krudaĵojn — malpezan kalcian karbonaton. Dank' al tio ili ne nur kontentigis la bezonojn de la malpeza industrio en la provinco sed ankaŭ solvis la problemon de malpurigo de mara akvo pro la eluzita likvaĵo.

La laboristoj de la fabriko fabrikis per siaj propraj manoj la tutan kompletan ekipaĵon ĝin produktantaj. Dank' al tio, en ĉiu jaro la fabriko povas flankprodukti pli ol 200 tunojn da malpeza kalcia karbonato.

La malpeza kalcia karbonato produktita per la eluzita likvaĵo povas esti uzata kiel plenigilo kaj estas materialo bezonata de la plasta kaj kaŭĉuka industrioj. Samtempe ĝi estas ankaŭ nemalhavebla materialo por la industriaj branĉoj de ĉiutagaj bezonaĵoj kiaj vitro, papero kaj emajlaĵoj.

HIDRAŬLIKA DIZELA ARGANO KUN 100-TUNA LEVKAPABLO POR FERVOJA UZO

Sub la forta subteno de koncernaj unuoj, disvolvante la revolucionan spiriton de sinapogo

sur propraj fortoj kaj penema lukto en mal-faciloj, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj de la Kikihaer-a Vagona Fabriko en Hejlonggiang-provinco sukcese provfaris hidraŭlikan dizelan arganon kun 100-tuna levkapablo por fervoja uzo.

Tiu ĉi argano kun progresinta teknika nivelo estas fabrikita el malaltaloja ŝtalo kaj havas la ĉefan hokon kun 100-tuna levkapablo kaj la helpan hokon kun 25-tuna. Ĝi povas mem veturi sen uzo de lokomotivo kaj estas uzata por translokigo, ŝarĝado kaj malŝarĝado de pezegaj varoj sur fervojo kaj por sava servo, tial ĝi estas unu el la gravaj ekipaĵoj en la ekonomia konstruado de nia lando.

UNIVERSALA EKZAMENMAŜINO POR POLIMERAJ MATERIALOJ

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Ĉangĉun-a Fabriko de Ekzamenmaŝinoj por Nemetalaj Materialoj mem projektis kaj sukcese fabrikis universalan ekzamenmaŝinon por polimeraj materialoj 1,000 kilogramojn pezan.

La maŝino kun elektrona aŭtomata registro havas progresintan strukturon kaj altsentemecajn kaj altprecizajn instalaĵojn por mezuri la streĉecon kaj premecon de materialoj. Krome, al ĝi estis instalitaj ankaŭ alttemperatura kaj malalttemperatura fornoj stabilaj en kapableco. Tial ĝi povas plenumi multkapablajn eksperimentojn al polimeraj materialoj.

tribuon al la revolucio mi faris malpli multe ol ili. Tio estas nenio alia ol la 'filozofio de vivkonservo' de Liu Ŝaŭki, kio venenis min, tiel ke mi ne zorgas pri la granda revolucia afero, deziras nur komforton de la familio, kaj ne nur mem ne revolucias, sed eĉ malhelpas alian en revoluciado." Ĉe tio ĉi li ne povis daŭrigi sian parolon. Poste, li iris al la estro de la produktogrupo kaj petis de li laboron de bredado de bovoj por la grupo. La grupestro timis, ke lia sano ne permesas tian penigan laboron kaj ne konsentis. Li diris: "Kiel maldankemaj estus ni malriĉkamaranoj, se ni ne partoprenus revolucionan laboron! Por la revolucio mi volentas eĉ morti pro penego!" Vidinte ke li estas firma, la grupestro akceptis lian peton. Ekde tiam li bredis 9 bovojn por la kolektivo.

Kvankam mia bopatrino jam estas 70-jara maljunulino, kaj krome analfabeto, tamen ŝi decidis gravuri en sian cerbon la "tri popularajn artikolojn" kaj la novan statuton de la Partio. Ŝi leviĝas frue kaj enlitiĝas malfrue, por ke la genepoj instruu al ŝi la tekstojn vorton post vorto. Ŝi ofte diris, ke la "tri popularaj artikoloj" kaj la nova statuto de la Partio estas orientilo por homa konduto kaj normo por aferoj. Ŝi ne nur estas rigora al si mem, sed ankaŭ aparte atentis pri edukado de la genepoj, ke ili agu laŭ la nova statuto de la Partio, laŭ instrukcioj de Prezidanto Maŭ, vive studu kaj vive apliku verkojn de Prezidanto Maŭ kaj konduku revolucion sekvante Prezidanton Maŭ por la tuta vivo.

Ĉinstila Forno por Kreskigo de Solkristalo

DISVOLVANTE la revolucionan spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado en malfaciloj, la ŝanhaja laborista klaso konstruis kun alta rapideco la unuan ĉinstilan fornon por kreskigo de solkristalo kun moderna teknika nivelo en nur 13 tagoj.

La forno por kreskigo de silicia solkristalo estas ŝlosila ekipaĵo por disvolvo de elektra industrio. La forno por kreskigo de solkristalo konstruita de la laborista klaso de nia lando kun simpla strukturo kaj avangarda teknologio superis la projektitan normon en produktokvanto kaj atingis avangardan nivelon. Ĝia sukcesa konstruiĝo pretigis favoran kondiĉon por disvolvi elektronan industrion de nia lando multe, rapide, bone kaj ekonomie.

La ĉinstila forno por kreskigo de solkristalo estas kreita de pli ol dek unuoj inkluzive de la Duonlabora kaj Duonlerna Lernejo de Kemi-industriaj Ekipaĵoj de Ŝanhajo kaj la Ŝanhaja Fabriko de Radi-industriaj Maŝinoj kun la spirito de komunisma kunlaboro. En la farado de tiu forno, ili trairis intensan batalon inter la du specoj de ideologio kaj la du linioj.

Kiam la ŝtato elmetis la taskon de konstruado de ĉinstila forno por kreskigo de solkristalo, la laboristoj de multaj fabrikoj de Ŝanhajo aktive respondis la alvokon. Ili firme decidis mem projekti ĝin, kuraĝe kreadi kaj fari kontribuon al la disvolvo de la elektra industrio de nia lando, sinapogante sur la propraj fortoj. Ĝuste en tiu momento, iuj homoj, kiuj ankoraŭ ne tute likvidis la influon de la kontraŭrevolucia reviziisma linio

de scienco kaj tekniko, antaŭenpuŝita de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj superstiĉe kredis fremdlandajn dogmojn, priskribis tian fornon kiel ion tre misteran kaj neatingeblan kaj asertis, ke estas absolute neeble por la laboristoj mem fari tion. Tion aŭdinte, la laboristoj tre indigniĝis kaj firme oponis tiun sklavecon antaŭ fremduloj. Ili diris, ke tiu ĉi batalo de farado de forno por kreskigo de solkristalo estas nenio alia ol luktado kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio kaj batalo por defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Ili diris, ke ili nepre elhakos novan vojon sin apogante sur la ĉiamvenka Maŭzedongpenso!

La Revolucia Komitato de Ŝanhajo montris plej firman subtenon al la revolucia sentimeco de la laboristaj amasoj kaj tuj kolektis personojn el koncernaj unuoj kaj organizis el ili batalgrupon por faro de solkristala forno.

Antaŭ la oficiala komenco de la laboro, la pli ol 30 laboristoj kaj projektistoj el diversaj unuoj foje kaj refoje studis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ pri “**sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj**”. Kun brava volo ili decidis elfari fornon por kreskigo de solkristalo kun plej granda rapideco kaj plej bona kvalito por gajni gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj por la granda socialisma patrolando!

Post ripetfoja diskutado, la batalgrupo decidis la projekton elfari fornon por kreskigo de solkristalo en 15 tagoj. Ilia heroo aspiro ricevis subtenon de la tuta laborista klaso de Ŝanhajo. Kiam iu ajn fabriko aŭdis, ke oni bezonas ion por


fari la fornon por kreskigo de solkristalo, ĝi tuj donis helpon tutforte.

Kiam la Jan-an-a Fabriko de Maŝin-modeloj, kiu respondecis pri farado de ligna modelo de la fornokorpo, ricevis bluplanon pri la fornokorpo alsenditan de la projekta grupo, la laboristoj kaj kadroj de la tuta fabriko tuj sin ĵetis en batalon. Ili uzis nur dekelkajn horojn por plenumi la taskon, kiu estas plenumbla ordinare en pli ol 15 ĝis 20 tagoj.

Kiam la Ŝanhaja Kaldronega Fabriko ricevis la taskon de gisado kaj prilaborado de la fornokorpo, la partia komitato de la fabriko tuj kunvokis urĝan kunsidon por diskuti pri ĝi. La sekretario de la partia komitato diris, ke la plenumo de la tasko estas ne nur politika batalo kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj la reakciuloj, sed ankaŭ akra batalo kontraŭ rampismo kaj sklaveco antaŭ fremduloj, kaj ili nepre devas plenumi la taskon. Sub la gvido de la kadroj, la laboristoj rapide kaj bone plenumis la taskon kun ekstreme alta entuziasmo.

Kiam la Ŝanhaja Fabriko de Veldverga Pulvoro informiĝis, ke oni bezonas ekipaĵon por kompletigi la fornon por kreskigo de solkristalo, ĝi tuj meminitiate prezentis sian ĵus ricevitan tian ekipaĵon, kiun ĝi urĝe bezonis. Ankaŭ multaj aliaj fabrikoj, kiuj ne ricevis taskon, konkure petis permeson partopreni la laboron.

Dank' al kuna klopodado de la laboristaro, la konstruado de la forno por kreskigo de solkristalo iris per la plej alta rapideco. La laboristoj de la Ŝanhaja Kaldronega Fabriko, kiuj respondecis pri la farado de la fornokorpo, altrapide plenumis la gisadon kaj prilaboradon de la for-



Ĉinstila forno por kreskigo de solkristalo

nokorpo en iom pli ol 4 tagoj. La laboristoj de la Maŝinfabriko Kiuging, kiuj respondecis pri farado de la interna parto de la forno, ĝustatempe plenumis sian taskon per daŭra batalo en du tagoj kaj du noktoj. Ĝustatempe liveriĝis ankaŭ la pli ol 50 maŝinpartoj en pli ol 30 specoj, pri kies farado respondecis la Ŝanhaja Fabriko de Radi-industriaj Maŝinoj. . . .

Dank' al kontinua batalado en tagoj kaj noktoj fare de dekelkaj malgrandaj fabrikoj, finfine naskiĝis la unua ĉinstila forno por kreskigo de solkristalo, kaj ĝi rapide produktis unuafoje brilan silician solkristalon. La ŝanhaja laboristaro armita per Maŭzedongpenso fine efektivigis sian ĵuritan promeson.

Kion Mi Vidis kaj Aŭdis sur Hajnan-insulo

HAJNAN-INSULO, sur kiu ĉiam estas varme kiel en printempo, estas la dua plej granda kaj riĉa mar-insulo de nia granda patrolando. Ĝi havas kromnomon Perlo en la Suda Maro. Sed en la mallumaj jaroj antaŭ la Liberiĝo, la laboranta popolo sur la insulo vivis tragike en la manko de manĝo kaj vestoj. Post la Liberiĝo, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, la fizionomio de Hajnan-insulo ege ŝanĝiĝis kaj precipe dank' al la Granda Proletara Kultura Revolucio, la sunbrilo de Maŭzedongpenso plene lumigis la insulon kaj milojn kaj milojn da familioj sur ĝi, kaj la popolanoj sur ĝi estas kontribuantaj siajn fortojn tage kaj nokte por ekspluati kaj konstrui ĝin en ankoraŭ pli belan socialisman trezoran insulon.

LA "DAĜAJ" SUR LA INSULO

En januaro, kiam la norda parto de nia granda patrolando estis en frosta vintro kun neĝflokaj flirtantaj super la senlima ebenejo, sur Hajnan-insulo en la suda parto de nia lando la vidaĵo estis tute alia. Suden veturante per aŭto de Hajkoŭ, mi vidis, ke ambaŭflanke de la ŝoseo alte staras kokosarboj, smeralde verdas kaŭĉukarbaroj kaj kultivejoj de ole-palmoj kaj dense kaj prospere kreskas diversaj tropikaj vegetaĵoj en senfina vasto.

Hajnan-insulo disponas pri tre oportunaj trafikaj rimedoj. Sur la larĝaj kaj glataj aŭtovojoj serpentumantaj en la regiono de Vuĝi-monto kuris kolonoj post kolonoj da kamionoj plene ŝarĝitaj per varoj kaj preterkuris nin flugrapide. Iu kunveturanta kamarado diris al ni, ke post la Liberiĝo la gefiloj de Hajnan-insulo ne nur konstruis Julin-Jinggehaj-fervojon, sed ankaŭ aŭtovo-

jan reton el rekonstruitaj kaj nove konstruitaj ŝoseoj sur la tuta insulo, kies totala longo estas pli ol sesoble pli granda ol tiu antaŭ la Liberiĝo. Por homoj kiuj unuafoje vizitas la insulon, ĉio vidita kaj aŭdita sur ĝi interesas kaj mirigas. En la sama tago ni jam atingis la celokon de nia vizito Ŝivu-brigado de Danhian-gubernio.

Ŝivu-brigado estas nomata la Daĝaj sur la mara insulo. En 1969, ĝi estis elektita kiel avangarda unuo de Guangdong-provinco en viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ. Dum nia restado en tiu brigado, la sekretario de la partia filio Hu Song kaj aliaj respondeculoj gvidis nin transgrimpinti montojn por rigardi iliajn kampojn. Se ili ne rakontas al ni pri la loko, neniu el ni povus imagi, ke la belaj montoj antaŭ niaj okuloj estis sovaĝejoj frekventataj de bestoj antaŭ dekkelkaj jaroj. De pli ol dek jaroj, precipe sub la antaŭenpuŝo de la Granda Proletara Kultura Revolucio, laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ "**malriĉeco igas aspiri al ŝanĝo, entreprenado kaj revolucio,**" la popolanoj de Ŝivu kreis tie kultivejojn de kaŭĉukarboj kaj fruktarbaroj; ili konstruis vastajn kampojn de stabila kaj alta produkto, kaj efektiviĝis ĉiuf flankan disvolviĝon de agrikulturo, forstado, bestbredado, flankokupa produkto kaj fiŝado. Kaj krome, la brigado fondis elektrejon, prilaborejon de grenoj, riparejon de agrikulturaj instrumentoj, prilaborejon de tropikaj vegetaĵoj kaj kulturajn kaj bonstatigajn instalaĵojn kiaj lernejoj, kuracejo, infanvartejo kaj disaŭdiga stacio. Ankaŭ la viv-nivelo de la komunumanoj pli kaj pli altiĝis. La valoro de la kolektivaj havaĵoj de la tuta brigado atingis en salto la sumegon de 2,300,000 *yuan*. La ŝanĝiĝo de Ŝivu-brigado refoje pruvis, ke se nur la grandaj principoj de Prezidanto Maŭ "**sinapogi sur propraj fortoj**" kaj "**peneme lukti**



Milicanoj de Jugang-brigado de Jahian-gubernio estas en trejnado.

en malfaciloj” estas plene efektivitaj en la baza nivelo, ili povas produkti senkomparan potencon.

NOVA FIZIONOMIO DE LA REGIONO DE VUĜI-MONTO

Forlasinte Ŝivu-brigadon, nia aŭto sin direktis al Tongŝi en la regiono de Vuĝi-monto. Veturinte tra Songtaŭ-akvokonservejo kaj Kjongĝong-gubernio meze de Hajnan-insulo, la aŭto kuris plene rapide laŭ la serpentuma ŝoseo sur la montoj. Ni rigardis tra la fenestroj kaj vidis, ke montpintoj staras unu super alia kaj la plej altaj montpintoj de Vuĝi-monto, simile al kvin gigantaj fingroj, alten leviĝas en nubojn. La popolanoj de la loko rigardas ilin kiel simbolon de la heroa popolo de Hajnan. En tre malproksima pasinteco, la Komunista Partio de Ĉinio jam starigis ruĝan bazlokon en tiu montregiono, kaj Kjongja-brigado, kiun prikantas la moderna baledo de nia lando *Ruĝa Virina Taĉmento*, iam brave batalis tie kontraŭ la japanaj agresantoj.

Tongŝi, la ĉefurbo de la Hajnan-a Aŭtonoma Subprovinco de la Li-a kaj Mjaŭ-a Nacioj, estas nova monturbo konstruita de la popolanoj de la han-a, li-a kaj mjaŭ-a nacioj per siaj laboremaj manoj inter sovaĝaj montoj. En la pasintaj dudek jaroj, la urbo Tongŝi loĝata de li-aj kaj mjaŭ-aj popolanoj multege ŝanĝiĝis same kiel multaj aliaj lokoj loĝataj de nacimalplimulto

nia tuta lando. Apud la urbo troviĝas okulfrapa pontego super Nanseng-rivero, larĝaj asfaltaj ŝoseoj ebligas facilan trafikon en ĉiuj direktoj, kaj ĉiuj altaj bonorde aranĝitaj konstruaĵoj de fabrikoj, lernejoj, vendejoj, banko, teatro, hospitalo, restoracio, hotelo ktp. estas nove konstruitaj. Ĉiuj laboristoj kaj laborantoj diversprofesiaj estas streĉe kreantaj riĉaĵojn por la socialisma patrolando. Ĉio en la monturbo sentigas vivecplenen kaj prosperiĝon.

La ŝanĝiĝo en la vivo de la li-aj kaj mjaŭ-aj popolanoj vere estas giganta. Pli bonan pruvon ni trovis ĉe Maŭdaŭ-popolkomunumo, kies membroj ĉefe estas li-oj.

Maŭdaŭ-komunumo sin trovas profunde en la montoj sudoriente de Tongŝi. Antaŭ la Liberiĝo, tie komunikado estis malfacila, la produkto estis postiginta kaj oni uzadis primitivajn terkulturajn metodojn. Kaj krome, la montposedantoj kruele ekspluatis la laborantajn popolojn, tiel ke ili vivis tragike kun vestaĉoj ne povantaj kovri siajn korpojn kaj ne havante sufiĉan manĝaĵon por satigi sin. En tiu tempo, spekulaciistoj venintaj al tiu loko trompis ilin dirante: “Estas facile plenkreskigi kokon, sed oni bezonas tre longan tempon por fari kudrilon el fera bastono per frotumo kaj krome fari trueton tra ĝia fino. Tion ja neniu povas fari, escepte de talentaj metiartistoj.” Sekve, per unu koko oni povis ŝanĝi nur unu kudrilon.



Hajnan-aj virinoj aktive partoprenas agrikulturan produktadon.

Cikaso tamen fine ekfloris. Ektondris la revolucio, la ruĝa suno eklumigis Vuĝi-monton kaj la li-a popolo estis liberigita. Ili laŭte kantis:

*Ja supron havas l' alta Vuĝi-monto,
La kvin riveroj longaj havas siajn fontojn,
Liberon Li-naci' akiris dank' al Kompartio,
Feliĉon al ni donis Prezidanto Maŭ.*

Sekve de la fondiĝo de agrikulturaj kooperativoj kaj popolaj komunumoj, la li-a popolo firme iras la larĝan vojon montritan de Prezidanto Maŭ kaj ĝuas ĉiam pli bonan vivon. Nun la komunumanoj ĉiuj loĝas en novaj domoj, en agrikulturo la malnovaj instrumentoj estas tute anstataŭitaj de la nov-tipaj, kaj progresintaj sistemo kaj tekniko estas aplikataj. Jaron post jaro plivastiĝas la plantareo de rizo kaj plialtiĝas la pomua produktokvanto.

La potenca torento de la Granda Proletara Kultura Revolucio puŝis la batalon de la li-a popolo kontraŭ la naturo al nova alta tajdo. En tre mallonga tempo, tiu popola komunumo kun nur iom pli ol 1,100 laborfortoj jam konstruis 13 riverbaraĵojn kaj 16 staciojn por irigacio kaj produkto de elektropovo per akvoradoj.

Maŭzedongpenso disŝutiĝis kiel ruĝaj semoj al ĉiuj familioj kaj ekfloris kaj fruktodonis en la koroj de la li-aj kaj mjaŭ-aj popolanoj.

EN LA ARMEA AGROKULTIVEJO DE HINGLONG

Dum nia vizitado al Hajnan-insulo, ni vizitis ankaŭ la Armean Agrokultivejon de Hinglong.

Tiu agrokultivejo situas apud Tajjang-rivero ĉe la orienta piedo de Vuĝi-monto. Kiam la respondeca kamarado sciigis, ke ni ĉiuj estas norduloj, li unue gvidis nin rigardi la pli ol cent specojn de tropikaj plantaĵoj kulturataj de ĝi. Interalie, ni vidis jam konatajn pipraron, kokosaron, bananaron, ananasplanton, sisalon kaj kafaron, kaj krome ankaŭ multajn fruktarojn transplantitajn el eksterlando, kiaj arboj de durio, mango, sablopiro, rambutano (*Nephelium lappaceum*), panfrukto, ovofrukto ktp. Tiuj tropikaj plantoj, neniam viditaj de ni en la pasinto, eĉ la nomon de iuj el kiuj ni neniam aŭdis, vere multege interesis nin.

Foje, respondeca kamarado gvidis nin viziti iun kafokultivejon. Tie ni renkontis kelkajn

laboristinojn kolektantajn kafograjnojn. Li iris al iu kamaradino kaj prezentis ŝin al ni: “Ŝi nomiĝas Huang Hujjong, aktivulino de nia kultivejo en viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ.” La knabino diris modeste: “Mi faris tre malmulte en studo kaj devas lerni de vi.” Kaj ŝi tuj komencis varme interparoli kun ni montrante grapolojn de tute maturaj kafgrajnoj sur la branĉoj antaŭ ni. La mallonga interparolo donis al ni impreson, ke la knabino estas ankaŭ lertulino en produkto.

Dank’ al viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ en multaj jaroj, la klasa konscio de la multnombraj revenintaj elmigrintaj ĉinoj laborantaj en la kultivejo multe leviĝis kaj la vortoj **“kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem”** gravuriĝis en ilian koron. La 75-jara Li Hajĝoŭ kiu revenis al la patrolando de Indonezio estas maljunulo vive studanta kaj vive aplikanta verkojn de Prezidanto Maŭ kun aktiveco. En la malnova socio, li suferis de malsato kaj manko de vestoj kaj devis formigri tra maroj kaj oceano kaj mizere vivaĉi kiel ŝarĝbrutoj penlaborante por kapitalistoj. Reveninte al la patrolando li liberiĝis kaj fariĝis mastro de la lando. Escepte de liaj tri filinoj kiuj studas en mezlernejo, ĉiuj 14 membroj de lia familio laboras sur siaj postenoj. Kun profunda kompreno el sia sperto Li Hajĝoŭ diris: “Grandaj estas la ĉielo kaj la tero, ili tamen ne estas tiom grandaj kiom la favoro de Prezidanto Maŭ. Nur dank’ al la gvido de Prezidanto Maŭ mi kaj mia tuta familio povas ĝui la hodiaŭan feliĉon.” Li tutkore sin dediĉas al la revolucio, tutkore sin dediĉas al la kolektivo kaj laboras diligente. Kamaradoj laŭdis lin: “Li Hajĝoŭ estas aĝulo kun ruĝa koro kaj lerninda ekzemplo por ni.”


La 13-jara ruĝa gvardianeto Vu Kjunfang estas filino de Vu Hjaŭĝong kiu revenis al la patrolando de Malajo. Ĉie cirkulas rakonto pri ŝia viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj ŝia savo de alies vivo spite al vivdanĝero. Iuvespere kiam ŝi estis lavanta vestojn ĉe puto kune kun sia amikineto Ĝang Hualian, la lasta falis en la puton 5 metrojn profundan pro malatento. Sen konsidero pri sia vivsekuro Vu Kjunfang tuj saltis en la puton por ŝin savi. Post vivmorta luktado dum pli

ol kvaronhoro fine ŝi sukcesis levi malgrandan Hualian el la akvo. En tiu kriza momento popolanoj alkuris informiĝinte pri la akcidento kaj savis malgrandan Hualian el la puto.

“Marnavigo dependas de stiristo, kaj revoluciado dependas de Maŭzedongpenso.” Observante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **“tenu la revolucion, stimulu la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito”**, la vastaj amasoj de ĝiaj oficistoj kaj laboristoj firme decidis ekspluati kaj konstrui trezorejon de la patrolando sur la bordo de Tajjang-rivero.

Sub la sunbrilo de Maŭzedongpenso, Hajnan-insulo, la Perlo en la Suda Maro, estas brile disradianta.

Hajnan-anoj batalantaj ĉe Bakbo-golfo forte tenas la revolucion kaj energie stimulas produkton, fiŝante kun pafiloj sur la ŝultro.



Liu Ĝikuj—“Nudpieda Kuracisto” de Fiŝistoj

LIU Ĝikuj estas fiŝisto-komunumano de Huajliu-brigado de Laŝan-komunumo de Hongze-gubernio de Giangsu-provinco. En 1967, komisiite de la fiŝistoj li partoprenis akupunkturajn kursojn organizitajn de ĈPLA-trupo subtenanta maldekstrulojn. La fiŝisto, kiu kutimis manipuli boatstangon kaj reton, renkontis nemal multe da malfaciloj en sia lernado. En la kurso li, jam pli ol 30-jara, estis la plej aĝa, sed malpli klera en legoscio. Kiam la kamarado de la kuraca taĉmento klarigis akupunkturajn punktojn antaŭ pendigita akupunktura grafikaĵo, ĉiuj aliaj faris notojn kaj desegnojn, sed li povis nur lerni parkere, ŝvitante sur la frunto.

Nokte, kuŝante sur la lito, Liu Ĝikuj ne povis endormiĝi. En lia memoro aperis la mizerplenaj travivaĵoj de lia familio antaŭ la Liberiĝo.

Lia familio multe suferadis de subpremo kaj ekspluato de bienuloj kaj tiranoj super fiŝistoj. Iun jaron, grave malsaniĝis lia patro. Spite al malsato, lia patrino iris tien kaj tien kaj fine malfacile sukcesis venigi kuraciston. Vidinte, ke la malsanulo estas mizera fiŝisto, tiu ĉi tuj sin turnis por foriri tute ne konsiderante pri la vivo de la malsanulo. Lia patrino brulis de ĉagreno kaj diris: “Kulpas tiu kiu ne savas mortanton!”

“Jam estas tempo por li morti!” respondis la kuracisto kun flegma rideto.

La sekvintan tagon mortis lia patro! Kiu familio de malriĉaj fiŝistoj ĉirkaŭ la vasta Hongze-lago ne havis historion plenan de sango kaj larmoj en la damninda malnova socio!

Post la Liberiĝo, la malriĉaj fiŝistoj fariĝis mastroj en politiko kaj havis garantion en vivo. Sed, rezulte de antaŭenpuŝo de la burĝara reviziisma higiena linio de la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj, al la vastaj amasoj de la fiŝistoj mankis kuracistoj kaj medikamentoj, kaj pro tio ili ne povis ricevi ĝustatempan kuracadon post malsaniĝo. Kiom arde ili deziris havi siajn proprajn kuracistojn! Tion pensante, Liu Ĝikuj faris firman decidon nepre ellerni akupunkturajn

por tutkore kaj tutanime servi al la fiŝistoj venkante ĉiujn malfacilojn, kiom ajn grandaj ili estos.

Post diligenta lernado li fine ellernis abocion de akupunkturo kaj kaŭterizo. Ekde tiam, kun medikamenta kesto pendanta de la ŝultro li aktivis en fiŝistaj vilaĝoj ĉirkaŭ Hongze-lago.

Li ofte pensas en si: Por esti bona “nudpieda kuracisto” de la popolo oni nepre devas aĝi ĉie laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ kaj ĉiam ligi sian koron kun tiuj de la klasaj gefratoj. Dum kuracado al fiŝistoj, se iu paciento timis pikadon, li do unue pikis sin mem por lin kuraĝigi.

Iuj lin demandis: “Por kio vi ĉiam faras ekzemplon sur vi mem?”

“Kio menciinda estas iom da provpikado sur mia propra korpo, por kuraci klasajn gefratojn!” serioze li respondis.

Ĉe la bordetendaĵo de Huajliu vivas okjara knabino Luo-nju. Ŝi estis saĝa kaj vigla antaŭ du jaroj. Sed poste, pro grava malsaniĝo, ŝi paralizigis kaj surdmutiĝis kaj scipovis preni manĝon nur kiam oni metis ĝin al ŝia buŝo. Apenaŭ fininte la kursojn, Liu Ĝikuj diris al la patro de la knabino: “Mi provu kuraci la infanon.”

“Ŝia onklo, ĉu eblas ŝin kuraci?” demandis la patro.

“Ĉu estas eble sukcese kuraci tian gravan malsanon?” diris ankaŭ aliaj al Liu Ĝikuj.

Li pensis en si: “Nur se estas iom da espero en tio, mi nepre dediĉos mian tutan forton por ŝin kuraci. Niaj karaj ĈPLA-anoj jam resanigis surdmutulojn per la nova akupunktura terapio, do mi nepre resanigos Luo-nju.”

En la komenco, la akupunktura kuracefiko montriĝis ĉe ŝi ne tre rimarkebla. Li do denove klopodis serĉi pikpunktojn sur sia korpo. Kiom da energio li elspezis kaj kiom da noktoj li maldormis, pro la malsano de la knabino! Kaj fine venis la tago, kiam la malgranda Luo-nju ekparolis.

En januaro de 1969, falis sinsekve neĝegoj. La temperaturo malleviĝis ĝis dekelkaj gradoj sub nulo C. Glaciĝis Hongze-lago. Ĉie blankis neĝo.

La fiŝboatoj apud la bordoj de Huajhe-rivero estis firme katenitaj de la glacio.

Ĉiutage, kun profunda amo al siaj klasaj gefratoj kaj portante medikamentan keston Liu Ĝikuj iris sur neĝo kaj glacio, de boato al boato kaj de domo al domo, por preventi kaj kuraci malsanojn al fiŝistoj.

Itage, kiam li sidiĝis por vespermanĝi, oni informis lin, ke malsaniĝis fiŝisto Ĝoŭ Dengmeĵ ĉe la transa bordo. Li tuj prenis sian medikamentan keston kaj ekiris. Apenaŭ li elboatiĝis kaj surpaŝis glacieron, kadro de la fiŝkapta grupo renkonte venis kaj demandis al li zorgeme: "Ĝikuj, baldaŭ noktiĝos, ĉu oni povas iri sur la glacio?"

"Sendube," respondis li, kiu bone sciis, ke estas danĝere iri sur la glacio, ĉar ĝi estis ie mal-dika kaj sub ĝi torentis profunda fluo. Sed pensante pri la brilaj heroaĵoj de kamarado Bethune, kiu savis vunditojn de la Okavoja Armeo spite al intensa kuglopluvo kaj pri la malsana fiŝisto senpacience lin atendanta, li iris antaŭen senhezite.

Post la vizito al la paciento, jam tute mallumiĝis. Maljuna Ĝoŭ foje-refoje lin admonis: "Nu, Ĝikuj, tranoktu ĉe mi, estas danĝere transpasi la riveron en la malluma nokto."

"Mi ne povas trankvile tranokti ĉe vi, ĉar tio povos malutili al mia servo, se oni ne trovos min por kuraco de malsanulo," respondis li, ordigante la medikamentan keston.

Liu Ĝikuj denove surpaŝis la glaciĝintan Huajhe-riveron. Kiam li atingis la rivermezon, "pum!" li falis en truon. La fluo portis lin sub la glacitavolon. Li englutis plenuŝojn da akvo, kaj retenante la spiron li forte sin ĵetis supren. Li rompis la glacieron per la kapo, kaj klopodis elrampi kun streĉita forto.

La vatitaj vestoj tramalsekiĝis kaj la kesto estis enpenetrata de akvo. La glacitavolo en la ĉirkaŭaĵo kreviĝis, kaj ne povis elteni lian pezon. Je ĉiu kroĉo de lia mano, derompiĝis peco da glacio. Kiom danĝere estis!

Citante en la koro la vortojn "faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon", kroĉante sin al glacio kaj antaŭen naĝante, fine li sukcese atingis la transan bordon.



La resanigita malgranda Luo-nju kaj Liu Ĝikuj

Kiam li eniris sian domon, la familianoj ek-kriis de miro, vidinte ke malaperis lia ĉapo, liaj vestoj malmoliĝis kaj liaj manoj sangas pro froto-vundo. Lia tuta korpo sensentiĝis kaj li preskaŭ perdis la konscion.

Post zorgema flegado li iom post iom reakiris sentokapablon. Ĝuste en tiu tempo, iu alvenis por peti lin iri kuraci malsanulon. Lia patrino diris: "Li jam ne povas iri, ĉar li falis en riveron kaj ĵus revenis." Sed Liu Ĝikuj, kiu tutkore zorgas pri la sano de la fiŝistoj, pene leviĝis de sur la lito spite la doloron tra la tuta korpo kaj diris: "Panjo, ne maltrankviliĝu, mi jam sentas min multe pli bona. Nur se restas al mi spiro, mi nepre servos al la fiŝistoj!" Tion dirante, li denove ekiris el sia domo.

En la domo de la malsanulino, li senripoze klopodis ĝis la sekvinta mateno, tiel ke la malsana knabino liberiĝis el danĝero. Firme tenante la manojn de Liu Ĝikuj, ŝia avo diris emocie: "Ho, Ĝikuj, dankojn pro via helpo, alie mia nepino jam perdus la vivon! Ni fiŝistoj nun havas tiel bonan kuraciston kia vi, ja dank' al la prizorgo de nia amata Prezidanto Maŭ!"

毛主席万岁！



La vastaj amasoj de la ĉefurbo entuziasme legas la “ĝojindan novaĵon” publikigitan kune de la ĵurnaloj Renmin Ribao kaj Jiefangjun Bao pri la sukcesa lanĉo de nia unua satelito.

Varma Aklamo al la Sukcesa Lanĉo de Nia Unua Artefarita Tersatelito

Pakistanaj maristoj en Hingang-haveno de Tiangin varme gratulas, ke nia lando sukcese lanĉis la unuan sateliton, kaj laŭte krias: “Vivu Prezidanto Maŭ!”





Ĉefurbaj laboristoj kantas kaj dancas por varme akلامي la sukcesan lanĉon de nia unua satelito.

Kiam la unua artefarita tersatelito lanĉita de nia lando traflugas super Pekino, la laboristinoj de la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko rigardas ĝin kun senkompara ĝojo.





Malsanula Lito en Hejmo

IUN vesperon, sur strato de la loĝkvartalo apud la unua kuracejo de Hinhua-hospitalo en Ŝanhajo, haste iris iu mezaĝa virino kun mansako en la mano, kvazaŭ ŝin atendis grava afero. Ŝi estis neniu alia ol la kuracistino Giang de Hinhua-hospitalo kaj nun ŝi rapidis viziti iun malsanulon.

Kuracistino Giang laboris jam pli ol dek jarojn. En la pasinteco, ŝi ĉiam atendis viziton de pacientoj, sidante en la hospitalo, sed nun ŝi konstante vizitas malsanulojn. Tio komenciĝis en la hospitalo nur post starigo de "malsanula lito en hejmo" reformo farita laŭ la proletara kuraca kaj higiena linio de Prezidanto Maŭ en la Granda Proletara Kultura Revolucio.

En tiu tago, pro kunveno kuracistino Giang ne povis akurate viziti sian pacieron maljunan Ju, tial, utiligante la tempon post vespermanĝo, ŝi alrapidis al li.

Kiam ŝi atingis la domon de la kuracato, la lasta ne estis hejme sed ĉe la najbaro por paroli pri sia ĝojo ke li povas la unuan fojon de pluraj jaroj iri suben al la teretaĝo por sunumi sin sub la libera ĉielo.

Tiam hejmen revenis de laboro edzino de maljuna Ju. Trovinte ke en la ĉambro sidas ne ŝia edzo sed la kuracistino Giang, ŝi tuj vokis: "Maljuna Ju, jam venis la kuracistino!" Reveninte rapide al sia ĉambro, maljuna Ju diris gaje: "Kuracistino Giang, vi denove vizitas min, kiel mi esprimu mian dankemon?"

"Kompare kun la instruo de Prezidanto Maŭ '**tutkore kaj tutanime servi al la popolo**', ni faris ankoraŭ tre malmulte!" respondis ŝi.

Tion aŭskultinte, maljuna Ju diris pli emociite: "Dankon al vi — bonaj kuracistoj agantaj laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ. Kiel estus mia hodiaŭo, se ne estus Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio?"

Jes, kiam maljuna Ju estis sesjara, li almozpmetis kune kun siaj gepatroj. En aĝo de dek unu jaroj li paŝtis bovojn por bienulo, kaj poste laboris en fabriko. Li ja multe suferadis de ekspluatado kaj subpremado en la malnova socio. Nur post la Liberigo, lia familio ekvivis en feliĉo.

La kruela subpremado de la malnova socio postlasis sur li malsanon tra la korpo kaj li devis nur pli frue emeritiĝi kaj tutajn tagojn kuŝis sur la lito. Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, sub influo de la kontraŭrevolucia reviziisma kuraca kaj higiena linio de la granda renegato Liu Ŝaŭki, la hospitalo tute ne zorgis pri faciligo al laborantaj popolanoj en kuracado. Ĉiufoje, por sin kuraci en hospitalo maljuna Ju devis preni veturilon kaj lia edzino devis peti forpermeson por lin akompani. Tiamaniere, li devis pagi multe da mono. Krome, tio ankaŭ influis lian edzinon en partopreno de produktado kaj lia malsano pli graviĝis pro laciĝo.

Nun, kuracistoj de Hinhua-hospitalo ofte vizitas mem la domon de maljuna Ju por doni kuracon. Li estas en sia hejmo kvazaŭ en malsanula ĉambro de la hospitalo. Tio ja estis neimagebla por li en la pasinteco. Tial, li ofte diris al aliaj: "La kuracistoj vere servas al ni laborantaj popolanoj post la tri jaroj de la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj reedukado de la laborista klaso."

Korespondi Deziras

Ĉeĥoslovakio

Dez. kor. kun ĉinaj geesperantistoj:

23-jara Peter Gregus, Bratislava-14,
Vychodna stanica 872

Emanuel Mimra, Uhrineves 565

Dez. kor. kun ĉina termezuristo: Olga Valentova, Holesouska 3, Bystrice Pod Hosynem, okres Kromeriz

Dez. kor. kun geesperantistoj de Azio, Eŭropo, Afriko kaj Latinameriko: Franciška Vojtěch, Karvina 4 Raj, Sovova 687

Danio

Hans Andresen, dez. kor. kun esperantistoj de Azio kaj Afriko kaj interŝ. poŝtkartojn ktp.
La adreso: Skibhusvej 122 5000 ODENSE

自力更生¹

Zili Gēngshēng
(propra forto reviviĝi)

Sinapogi sur Propraj Fortoj

“自力更生”是我²国社会主义建设的基本
“Zili gēngshēng” shì wǒ guó shèhuìzhǔyì jiànshè de jīběn
(propra forto reviviĝi esti mi lando socialismo konstrui de baza
“Sinapogi sur propraj fortoj” estas la baza principo de la socialisma konstruado en nia

方針。在这个方針指引下，我国农业生产
fāngzhēn. Zài zhège fāngzhēn zhǐyǐn xià, wǒ guó nóngyè shēngchǎn
principo je tiu principo gvidi sube mi lando agrikulturo produkti
lando. Sub la gvido de tiu principo, la agrikultura produkto de nia lando en

连年获得丰收，工业生产、科学技术也出现了
liánnián huòdé fēngshōu, gōngyè shēngchǎn, kēxué jìshù yě chūxiànle
sinsekva jaro akiri riĉrikolto industrio produkti scienco tekniko ankaŭ aperis jam
sinsekvaj jaroj akiris riĉajn rikoltojn, aperis plenamplekse prospera situacio ankaŭ en industria

一片蓬蓬勃勃的局面，许多工矿企业不断刷新
yīpiàn pēngpēngbóbóde júmiàn, xǔduō gōng-kuàng qǐyè bùduàn shuāxīn
plenamplekse prospera situacio multa fabriko minejo entrepreno senĉese renovigi
produkto, scienco kaj tekniko, multaj fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj senĉese renovigas

纪录，创造了历史上最高生产水平，技术革命
jìlù, chuàngzàole lìshǐ shàng zuì gāo shēngchǎn shuǐpíng, jìshù géming
rekordo krei historio sur plej alta produkti nivelo tekniko revolucio
siajn rekordojn kaj kreis la plej altan produktan nivelon en la historio, teknika revolucio

正在不断发展，市场繁荣，物价稳定。我国已经
zhèngzài bùduàn fāzhǎn, shìchǎng fánróng, wùjià wěndìng. Wǒ guó yǐjīng
esti-anta senĉese disvolvi merkato prosperi objekt-prezo stabila mi lando jam
estas senĉese disvolviĝanta, la merkato prosperas, kaj la prezoj estas stabilaj. Nia lando jam fariĝis

成为一个既³无内债，又无外债的社会主义国家。
chéngwéi yīge jì wú nèizhài, yòu wú wàizhài de shèhuìzhǔyì guójiā.
fariĝi unu havi nek interna ŝuldo havi nek ekstera ŝuldo de socialismo ŝtato)
socialisma ŝtato, kiu havas nek internan ŝuldon nek eksteran ŝuldon.

[Klarigo] En ĉiuj unuaj linioj estas ĉinaj ideografaĵoj; en ĉiuj duaj linioj estas ties skribformo en la fonetika alfabeto; en ĉiuj triaj linioj estas signifoj de koncernaj vortoj en Esperanto; kaj en ĉiuj kvaraj linioj estas esperanta traduko de la frazoj. Necesaj klarigoj por malfacilaj punktoj estas donataj sube:

1. “自力更生” (propraforte reviviĝi) estas parolturno el la malnova literatura lingvo,

uzata nun en la nuntempa lingvo en la senco “sinapogi sur la propraj fortoj en strebado al io”.

2. “我” ĉi tie funkcias kiel posesivo antaŭ substantivo en senco de “我們的” (nia). Tio estas aparta uzado de “我” (mi).

3. “既...又...” funkcias kiel konjunkcio kun signifo simile al Esperanta esprimo “kaj... kaj...” aŭ kune kun negativaj vortoj, simile al “nek... nek...”.

Indigne Tajdas la Batalo de la Kamboĝa Popolo

SUBINSTIGANTE la dekstrulan klikon de Kamboĝo lanĉi la ŝtatrenverson je la 18-a de marto kontraŭ la ŝtatestro Samdek Norodom Sihanuk, la usona imperiismo ne nur barbare intervenis en la internajn aferojn de Kamboĝo, sed ankaŭ faris seriozan paŝon por plivastigi sian agresan militon en Hindoĉinio. La usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj raviĝas je la sukceso de sia artifiko, sed efektive levis ŝtonegon kaj ĝin faligis nur sur siajn proprajn piedojn. Iliaj krimaj agoj vekis potencon indignan tajdon de la kamboĝa popolo kaj aliaj popoloj de la tuta Hindoĉinio kontraŭ la usona imperiismo.

La tago, en kiu la kamboĝa ŝtatrenversa kliko enpotenciĝis apogate de la bajoneto, estis ĝuste la tago, en kiu ĝi dronis en marĉon. Respondante al la alvoko de sia ŝtatestro Sihanuk, la patriotaj popolanoj de diversaj socitavoloj amase leviĝis sentime al batalo, kaj la ondoj de batalo kontraŭ la ŝtatrenversa kliko rapide etendiĝis al plejparto de la provincoj de Kamboĝo en mallonga tempo. La popolo en la provinco Kompong Cham unue donis solidan baton al la ŝtatrenversa kliko. Dekoj da miloj da manifestaciantaj kamparanoj indigne ruinigis la sidejojn de kelkaj guberniaj registaroj. La manifestaciantaj amasoj en la urbo Kompong Cham ruinigis ankaŭ la sidejon de la provinca registaro kaj la juĝejon de la ŝtatrenversa aŭtoritato kaj bruligis arkivojn kaj dokumentojn. Du reakciaj “membroj de la nacia asembleo” estis ĝismorte batitaj de la indignantaj amasoj per klaboj. La manifestaciantaj amasoj atakis kaj mortigis ankaŭ la reakcian policestron Hin Nil — la pli junan fraton de Lon Nol. Grandskalaj amasaj manifestacioj por subteni la ŝtatestron Samdek Sihanuk kaj oponi la ŝtatrenversan klikon eksplodis unu post alia en Prey Veng, Takeo, Kampot, Kratie, Kandal kaj kelkaj aliaj provincoj. La tajdo de amasaj manifestacioj estas nekontraŭstarebla precipe en la vastaj kamparaj regionoj. La “defenda ministerio” de la ŝtatrenversa kliko devigite

konfesis, ke “tumulto” okazis “en la plejmulto de la provincoj”. Eĉ ankaŭ okcidenta novaĝ-agentejo diris, ke la batalo de la kamboĝa popolo kontraŭ la ŝtatrenversa kliko “estas etendiĝanta kiel flamanta meĉo al diversaj regionoj de la lando”, ke eĉ la lokaj aŭtoritatoj en iuj provincoj kaj nombro da unuoj de la armitaj fortoj oponas kontraŭ la ŝtatrenversa kliko.

La kliko de Lon Nol kaj Sirik Matak estas terurita precipe de la rapida disvolviĝo kaj kreskado de la kamboĝaj patriotaj fortoj kiuj donis al ĝi sinsekvajn pezajn batojn. Okcidentaj novaĝ-agentejoj kaj gazetaroj kriis alarme, ke la patriotaj fortoj “jam komencis gerilan militon” “en nordaj kaj centraj kamboĝaj provincoj oriente de Mekong-rivero” kaj la kvin landlimaj provincoj estas “fakte sub la milita kontrolo” de la patriotaj fortoj. Agentejo de la Franca Gazetaro informis, ke “unu tuta regiono” ĉe la orienta landlimo de Kamboĝo “jam falis en la manojn” de la patriotaj fortoj, “en iuj sektoroj, nur la ĉefaj ŝoseoj kaj kelkaj militaj postenoj estas ankoraŭ tenataj de la registaro (la ŝtatrenversa kliko), dum en ceteraj restas neniu bazo de la registaro (la ŝtatrenversa kliko)”. En la provinco Svay Rieng, la ŝtatrenversa kliko lastatempe sendis trupojn por subpremi la patriotajn fortojn, sed renkontis furiozan kontraŭatakon de la lastaj kaj devigite retiriĝis en paniko de la orienta parto de la provinco. La milita preparolanto de la ŝtatrenversa kliko konfesis en la 9-a de aprilo, ke “estis forlasitaj ĉiuj antaŭpostenoj laŭ la landlima regiono konata kiel la ‘Papaga Beko’ 70 ĝis 90 mejlojn sudoriente de la ĉefurbo”. Okcidenta novaĝ-agentejo raportis, ke “en tri tagoj”, “duono de la regiono” de la provinco Svay Rieng jam venis “sub la kontrolon” de la patriotaj fortoj kaj estis starigita loka provizora komitato de la Nacia Unueca Fronto de Kampuča.

La kliko de Lon Nol kaj Sirik Matak ne nur estas sieĝata de la popolo en la lando, sed ankaŭ ĉiam pli izoliĝas eksterlande. Post la ŝtatrenverso, krom


tio ke ĝin senpacience rekonis ĝia mastro la usona imperiismo, por ĝi distrumpetas nur la kelkaj ĉenhundoj de la usona imperiismo, kiaj la marionetaj klikoj de suda Vjetnamio kaj Tajlando kaj la faŝisma militista reĝimo de Indonezio. Spite al tio, ke la ŝtatrenversa kliko plenenergie ludas duoblan kontraŭevolucian taktikon, ripetade asertis ke ĝi daŭre “tenos la politikon de sendependeco, paco, rigora neŭtraleco, suvereneco kaj teritoria integreco” kun la vana espero trompi la mondajn popolojn, tamen per siaj agoj ĝi jam malkaŝis tiun monstran mensogon. Fakte ĝi delonge jam “plonĝis en la usonan tendaron”. Freneze farante aktivadojn kontraŭ la vjetnama popolo, tiu ĉi dekstrula kliko cinike akuzis Vjetnamion pri “agreso” kontraŭ Kamboĝo kun la intenco per tio inciti la nacian sentimenton, deturni la atenton de la enlanda popolo kaj la monda publika opinio, kovri la agresajn krimojn de la usona imperiismo kaj krei publikan opinion por akiri “internacian intervenon”. Lastatempe, ĝi eĉ senkaŝe petis la Unuigitajn Naciojn manipulatajn de la usona imperiismo ekspedi “observan grupon” al Kamboĝo kaj eĉ publike kriaĉis ke ĝi estas preta akcepti usonan militan “helpon”. Sekve, la lojala lakeo de la usona imperiismo en UNO U Thant rekonis, laŭ la ordono de sia mastro, la kamboĝan dekstrulan klikon de Lon Nol. Sed, tio neniom helpas la klikon de Lon Nol elturniĝi el la nuna embaraso.

Ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj. Nelonge post la sursceniĝo de la kliko de Lon Nol kaj Sirik Matak, ĝia naturo de papera tigo jam estis plene malkaŝita. Terurite de la potenca rezistado de la popolo, ĝi estas ĉiam maltrankvila kaj nur povas fari senesperan baraktadon per bajonetoj. Eĉ en Phnom Penh, la ĉefoj de la kliko kvazaŭ sidas sur pingloj kaj kuraĝigas sin per grandaj nombroj da tankoj, kirasaŭtoj kaj trupoj. Lastatempe, ĝi sinsekve ekspedis trupojn por subpremi la popolamasojn kaj la patriotajn fortojn kun la intenco estingi la ardan fajron de popola batalo, sed la trupoj de tiu kliko estis draŝitaj de la patriotaj fortoj kaj suferis seriozajn perdojn tiel ke la hospitaloj en Phnom Penh estas plenigitaj de vunditaj soldatoj. Timante, ke la popolo faros manifestaciojn en Phnom Penh, tiu kliko sendis grandajn kvantojn da trupoj por blokadi ĉiujn vojojn, pontojn kaj pramejojn al Phnom Penh, malpermesis kunvenon de pli ol tri personoj, efektivigis fajrkovron ktp. Ĉio ĉi tio forte montris, ke tiu, kiu estas vere potenca, estas ne la kliko de Lon Nol kaj Sirik Matak sed la kamboĝa popolo.

Eĉ iuj okcidentaj novaĝ-agentoj kaj gazetaroj diris, ke la ŝtatrenversa kliko de Lon Nol kaj Sirik Matak “jam dronis en la ‘oceano’ de popolo”, estas “reĝimo starigita ‘sur sablejo’” kaj ĝia estonteco estas “tre malhela”.

Sub la gvido de la ŝtatestro Samdek Norodom Sihanuk, la justa batalo de la kamboĝa popolo por defendi sendependecon, pacon, neŭtralecon, demokration, ŝtatan suverenecon kaj teritorian integrecon tajde torentas antaŭen kaj la situacio ĉiam pli favoras al la kamboĝa popolo kaj malfavoras al la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. La justa batalo de la kamboĝa popolo ricevis simpatian kaj subtenon de la vjetnama popolo, laosa popolo kaj la pacamaj popoloj de la tuta mondo. Kiel ajn energie baraktos la kliko de Lon Nol kaj Sirik Matak, ĝi neniel povos bari la antaŭenmarŝon de la kamboĝa popolo. Venko certe apartenos al la kamboĝa popolo, kiu havas gloran tradicion de batalo kontraŭ imperiismo.

La sidejo de la provinca registaro de la dekstrula ŝtatrenversa kliko de Lon Nol kaj Sirik Matak, lakeoj de la usona imperiismo, estis indigne bruligita kaj detruita de la manifestaciantaj amasoj en Kompong Cham subtenantaj la ŝtatestron Samdek Norodom Sihanuk.



Venko Certe Apartenos al la Popoloj de Hinduĉinio

LA agresema usona imperiismo freneze plivastigas sian agresan militon en la regiono de Hinduĉinio. Unuflanke ĝi energie "vjetnamigas" la agresan militon en Vjetnamio por intensigi la agresan militon, faras frenezajn bombadon, masakron kaj prirabon kontraŭ la vjetnama popolo kaj ekspedis grandan nombron da tajlandaj komplikoj-trupoj en Laoson por plue plivastigi tie la agresan militon; aliflanke ĝi subinstigis la dekstrulan klikon fari ŝtatrenverson en Kamboĝo, senkaŝe ekspedis sian agresan trupon kaj sudvjetnaman marionetan trupon por invadi Kamboĝon kun la intrigo turni Kamboĝon en sian kolonion kaj militan bazon kaj per tio efektivigi

sian ekstravagancan ambicion aneksi la tutan Hinduĉinion kaj agresi Azion.

La krimaj agoj de senkaŝaj armitaj agreso kaj interveno de la usona imperiismo kontraŭ Hinduĉinio refoje senmaskigis la agreseman naturon de la tiel nomata "doktrino de Nixon".

En siaj krimaj aktivadoj de agreso kontraŭ Azio, la usona imperiismo de ĉiam rigardas kiel tre gravan la strategian pozicion de regiono de Hinduĉinio. Post la Dua Mondmilito, la usona imperiismo etendis siajn agresajn ungegojn en Hinduĉinion. En 1947, Usono subinstigis kampanjon de restaŭro de la baodai-a reĝa familio en Vjetnamio. Post



La Popola Liberiga Armeo kaj la patriotaj armitaj fortoj de Laoso estas pretaj por en ĉiu ajn momento bati la usonajn rabistojn kaj iliajn lakeojn.



Hanojaj popolanoj de Vjetnamio kunvenas por forte protesti kontraŭ masakro farita de la kamboĝa dekstrula reakcia kliko al vjetnamaj popolanoj loĝantaj en Kamboĝo.

1950, la usona imperiismo donis multe da milita helpo al la franca agresa trupo en Hindoĉinio. Ĉirkaŭ 70 procentoj de la milita elspezo de la francaj koloniistoj estis provizitaj de la usona imperiismo. La usona imperiismo eĉ senkaŝe ekspedis siajn aerarmeajn personojn por rekte partopreni tiun ĉi kriman militon.

Per peniga rezista milito la heroaj hindoĉiniaj popoloj fine venkis la francajn agresantojn. Sed, en 1961, la registaro de Kennedy senskrupule ekspedis grandan nombron da militaj personoj en sudan Vjetnamion, komplotante kune kun la sudvjetnama milita marioneto, faris "specialan militon", kaj per tio denove puŝis la popolon de suda Vjetnamio en sangverŝadon. Post sia sursceniĝo Johnson pli furioze multigis siajn trupojn en suda Vjetnamio kaj "eskaladis" la agresan militon kontraŭ Vjetnamio. La usona imperiismo ĉiam praktikas la reakciajn politikojn de interveno en internajn aferojn de Laoso kaj de intensigo de la agresa milito kontraŭ Laoso. De la lastaj jaroj, la usona imperiismo ne nur armis la armeon de la laosa reakciularo per granda kvanto da armiloj kaj militaj materialoj, sed ankaŭ rekte ekspedis pli ol 10,000 militajn konsilistojn kaj militajn personojn en Laoson kaj senĉese faris barbarajn "mordetajn" atakojn kontraŭ la liberigitaj regionoj de Laoso. Lastatempe, Nixon-registaro sendis pli kaj pli multajn dungitajn tajlandajn trupojn en Laoson por rapidigi la intensigon de la agresa

milito. De pli ol dek jaroj, la usona imperiismo ĉiurimede puŝis la politikon de agreso kaj renverso kontraŭ Kamboĝo, ĝis la subinstigado al la kamboĝa dekstrula kliko en ĝia reakcia ŝtatrenverso kontraŭ la ŝtatestro Samdek Norodom Sihanuk. La 30-an de aprilo, la usona imperiismo faris grandskalan armitan agreson kontraŭ Kamboĝo laŭ la ordono de la usona prezidanto Nixon.

La historio elokvente pruvis, ke la usona imperiismo estas morta malamiko de la popoloj en Hindoĉinio.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **"La usona imperiismo fabrikas streĉan situacion ĉie en la mondo por atingi sian celon agresi kaj sklavigi la popolojn de diversaj landoj. La usona imperiismo opinias, ke streĉa situacio ĉiam estas favora al ĝi, sed fakte tiu streĉa situacio fabrikita de Usono iras al la malo de la usonana deziro kaj ludas la rolon mobilizi la popolojn de la tuta mondo por oponi kontraŭ la usonaj agresantoj."** La fakto ja estas tia. La usona imperiismo rapidigas la plivastigon de la agresa milito en regiono de Hindoĉinio kaj senĉese faras novajn militajn aventurojn, kio ludas la rolon eduki kaj mobilizi la popolojn de Hindoĉinio por brave leviĝi al batalo kontraŭ la usona imperiismo.

Nuntempe, la popoloj de ĉiuj landoj de Hindoĉinio levas novan ŝtormon de batalo kontraŭ

la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kaj la usona imperiismo pli kaj pli profunde dronas en ring-post-ringa sieĝo de la revoluciaj popoloj.

Sub la gvido de la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo sub la Gvido de la Nacia Unueca Fronto de Kampuĉa, arde bolas la batalo de la heroa kamboĝa popolo kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝia lakeo dekstrula kliko de Lon Nol kaj Sirik Matak kaj en mallonga tempo ĝi rapide disvolvigis en plimulton de la kamboĝaj provincoj. La kamboĝaj patriotaj armitaj fortoj disvolvis bravan batalon kontraŭ la entrudiĝintaj usonaj agresaj trupoj kaj sudvjetnamaj marionetaj trupoj kaj la kamboĝaj dekstrulaj trupoj, tiel solide draŝis la malamikojn ke ili falis en teruran embarason. La kamboĝa dekstrula ŝtatrenversa kliko, lakeo de la usona imperiismo, falis en malesperan senelirejon.

Persistante en la batalo kaj brave kondukante kontraŭatakojn, la nesubigeblaj heroaj patriotaj armitaj fortoj kaj popolo de Laoso akiris venkojn unu post alia kaj donis pezajn batojn al la usona imperiismo kaj la laosa reakciularo.

Persistante en longdaŭra popola milito, la heroa vjetnama popolo nokaŭtis la usonan imperiismon ĝis neriparebla malvenko. De la ĉijara printempo, la popola liberiga armita forto de suda Vjetnamio faris senĉesajn atakojn kaj akiris novajn militajn atingojn. Sub la batado de la brava vjetnama popolo, la usonaj agresantoj agonias sur la batalkampo de suda Vjetnamio.

La longdaŭra batalo de la hindoĉiniaj popoloj kontraŭ imperiismo pruvis, ke por la popoloj de ĉiuj landoj la unika rimedo por gajni kaj defendi la nacian sendependecon estas sinorganizi kaj fari pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la tirana usona imperiismo. Lando, ĉu granda, ĉu malgranda, povas fiaskigi la agresan intrigon de la usona imperiismo kaj akiri venkon en la kontraŭimperiisma patriota batalo, se ĝi estas sentima al barbaraj fortoj, kuraĝas batali kaj firme sinapogas sur la vastaj popolamasoj.

Certe fiaskos la usona imperiismo!

Venke certe apartenos al la popoloj de Hindoĉinio!

Batalantoj de la popolaj liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio lanĉis bravan atakon kontraŭ la malamiko.



Nova Krismo de la Sovetunia

Reviziisma Renegata Kliko Perfide

al la Sovetunia Popolo

LA sovetunia reviziisma renegata kliko refoje faris novan krimon perfide al la sovetunia popolo, per sendo de vicprezidanto de la konsilantaro de ministroj de USSR I. T. Novikov al Japanio por pliintensigi la komploton kun la japana reakciularo — la ĝendarmo de la usona imperiismo en Azio.

Novikov ja iris anstataŭ Podgornej, sub la preteksto de ĉeesto de la “sovetunia tago” de la “Universala Foiro” en Japanio por fari intrigojn dum la vizito de la 7-a ĝis la 14-a de aprilo.

Laŭ la intenco de la ĉefoj de sovetunia reviziismo, Novikov plenforte klopodis altiri kaj flati la reakcian Sato-registaron. Je la 8-a de aprilo, li faris sekretajn interparoladojn kun la ĉefo de la japana reakcia registaro Eisaku Sato kaj ĝia ministro de eksteraj aferoj Kiiĉi Ajĉi respektive. Kiel malkaŝite, dum interparolo kun Sato, Novikov foje kaj refoje esprimis “saluton” de Breĵnev, Kosigin kaj Podgornej kaj enmanigis al Sato leteron skribitan de Podgornej. En la letero Podgornej esprimis, ke Sovetunio volas kontrakti pacan traktaton kun Japanio, kaj ke la du landoj povas disvolvi sian “amikan interrilaton” eĉ antaŭ ol la paca traktato estos kontraktita. Krome, li multe parolis pri “ĉiam kreskanta konfido inter la du landoj” k. s. Kiel raportite, por flati la reakcian Sato-registaron Novikov cinike vizitis la mikadon kaj senhonte petis Saton viziti Sovetunion. Krom tio, Novikov pli klare esprimis, ke Sovetunio pretas “tuj komenci traktadon inter la du registaroj” pri la problemo de sekura fiŝado inter la du landoj, kiel necesan paŝon por realigi la viziton de Sato al Sovetunio.

Dum sia vizito Novikov energie kolportis la nigran varon de Breĵnev — “sistemo de kolektiva sekureco en Azio” kaj kriaĉis pri intensigo de kunlaboro inter Sovetunio kaj Japanio “por forigi krizon en Vjetnamio kaj Meza Oriento”. Tio malkaŝis la kriman intencon de la sovetunia reviziisma renegata kliko komploti kun la usonaj kaj japanaj reakciuloj por pliapaŝe subpremi la vigle leviĝantajn naciliberigajn batalojn de la popoloj en Hindoĉinio kaj de la arabaj popoloj.

Novikov senskrupule aŭkciis en Japanio sovetunian suverenecon kaj senhonte invitis la japanan monopolan kapitalon rabi abundajn subterajn riĉfontojn en Siberio. En la “Universala Foiro” Novikov flatis la japanajn reakciulojn, ke ili “surpriziĝas pri la miriga ekonomia disvolviĝo de Japanio”. Kaj samtempe li fanfaronis ke “Siberio kaj la malproksima oriento (de Sovetunio) havas brilan estontecon”, intencante logi la japanan monopolan kapitalon al “ekspuato” de Siberio. Li promesis liveri al la japanaj reakciuloj materialojn pri la kvantoj de subteraj riĉfontoj de Siberio. Novikov faris “interparolojn” kun ĉefoj de prosonaj grupoj de monopola kapitalo de Japanio Uemura Kogoro, prezidanto de la Federacio de Ekonomiaj Organizoj de Japanio, kaj Nagano Ŝigeo, prezidanto de la Komerca kaj Industria Ĉambro de Japanio, almozule petegis la japanan monopolan kapitalon plie helpi Sovetunion en “ekonomia ekspuato”. Novikov proponis al la komerca kaj industria ministro de Japanio Kiiĉi Mijazava kiel eble plej frue okazigi traktadon inter Japanio kaj Sovetunio pri la kvinjara komerca interkonsento validiĝonta de 1971 kaj pliigi la nunan jaran totalan valoron de importoj kaj eks-

porto de ambaŭ flankoj inter Sovetunio kaj Japanio de 729,000,000 al 2,000,000,000 usonaj dolaroj.

En sia parolado farita ĉe la "Universala Foiro" je la 10-a de aprilo, Novikov akceptis la sloganon de Sato "por progreso kaj harmonio de la homaro", energie laŭdis, ke tiu slogano "estas por ni intima", kaj babilaĉis senbride ke "io ajn, kio certigas al la homaro dignon kaj feliĉon, estas komunisma slogano", arbitre prenante tian gurditan frazon de la burĝaro kiel "komunisman sloganon". Tio estas serioza ofendo kontraŭ komunismo kaj nova plena malkaŝo de la renegata vizaĝo de la sovetunia reviziismo.

Por montri la "harmonion" inter la sovetunia reviziismo kaj usona imperiismo per praktika agado, Novikov senhonte vizitis speciale la "usonan halon" en la "Universala Foiro". Rerezentanto de la usona registaro rekompencis tiun "honoron" de la reprezentanto de la sovetunia reviziismo per ĉesigo de akcepto de ordinaraj vizitantoj.

Ankaŭ la reakcia Sato-registaro utiligis la viziton de Novikov por allogi la sovetunian revizi-

isman renegatan klikon. Antaŭ ol Novikov atingis Japanion, la urba policejo de Tokio jam starigis "altklasan gardan sistemon". Post kiam li venis al Japanio, ĉiu loko, kien li iris, estis rigore gardata. En Osaka, Sato-registaro eĉ kolektis 2,000 armitajn policanojn por gardi Novikov. Krome, Sato sendis registaran reprezentanton por partopreni la ceremonion de la "sovetunia tago" de la "Universala Foiro", kaj tiu energie distrumpetis, ke "Japanio kaj Sovetunio" devas "pliapaŝe intensigi sian kunlaboron". La japana monopola kapitalo faris apartan aranĝon, por ke Novikov povu viziti serion da kompanioj kaj fabrikoj de monopola kapitalo, kontakti kaj interparoli kun iliaj reprezentantoj. Evidente, kaptante la ŝancon ke la sovetunia renegata kliko klopodas alproksimiĝi al la reakcia Sato-registaro, la japanaj reakciuloj kreas kondiĉojn por eniri Siberion kaj pliapaŝe intensigas ĉiuf flankan koluzion kun la sovetunia reviziismo en politiko, ekonomio, eĉ militaj aferoj ktp. La absurdaj agoj de la ĉefoj de la sovetunia reviziismo certe vekos pli intensan oponon ĉe la sovetunia popolo kaj ili fine devos manĝi la maldolĉan frukton, kiun ili mem kulturis.



220,000-KILOVATA MINIMUM-OLEA CIRKVITROMPILO

220,000-kilovata minimum-olea cirkvitrompilo kiu havas progresintan nivelon, estas sukcese provfarita kaj nun jam grandnombre produktata de la Ŝanhaja Ŝaltila Fabriko.

Tia alttensia cirkvitrompilo sin karakterizas per malmulta pezo, malgranda volumeno, granda kapacito, rapida ŝaltado kaj ŝparo de konsistigaj materialoj. Uzante tian cirkvitrompilon anstataŭ la alttensian cirkvitrompilon kun multa olekonsumo, oni povas ŝpari grandajn kvantojn da feraj kaj neferaj metaloj, izolaj materialoj kaj altklasa oleo por transformatoro kaj pluapaŝe kontentigi ankaŭ la bezonon de la elektropova industrio de nia

lando en rilato de alttensiaj oleaj cirkvitrompiloj.

LA UNUA GRANDA IRIGACIA SISTEMO FUNKCIIGATA PER ELEKTRAJ PUMPILOJ EN ŜENHI

La Irigacia Sistemo Funkciigata per Elektroj Pumpiloj "Dongfanghong" estas la unua granda irigacia konstruo en Ŝenhi-provinco. Lastatempe, la tuta konstruo estis sukcese plenumita kaj lanĉita al irigaciado. La sistemo inkluzivas 30 pumpilajn staciojn, ĉefajn kaj branĉajn kanalojn kun totala longeco de pli ol 440 kilometroj kaj pli ol 10,000 diversajn konstruaĵojn. La pumpado dividiĝas en 8 ŝtupojn kun totala pumpa alteco de 86 metroj. Dank' al la starigo de tiu sistemo, oni turnis 1,180,000 muojn da neirigaciataj kampoj de la 5 gubernioj sur Vejbej-altebenejo, kiuj estas ĝia ĉefa gren- kaj kotonproduktejo, en irigaciatajn kampojn kaj tiel kreis favorajn kondiĉojn por batalakiri stabile altan produktadon de greno kaj koton.



NOVAJ MILITAJ ATINGOJ AKIRITAJ DE LA ARMEO KAJ POPOLO DE SUDA VJETNAMIO

De la fino de marto ĝis la komenco de aprilo de 1970, la armeo kaj popolo de suda Vjetnamio atakis la malamikon en diversaj batalkampoj de la provinco Quang Tri ĝis la Mekong-a Delto kaj akiris multajn novajn militajn atingojn.

De la 30-a de marto ĝis la 5-a de aprilo, la popolaj liberigaj armitaj fortoj de la provinco An Giang ĉe la Mekong-a Delto ekstermis kaj deorganizigis ĉ. 500 malamikojn kaj ruinigis 20 tankojn kaj kirasaŭtojn.


Komence de la nokto de la 28-a de marto, la armeo kaj popolo en la orienta parto de Nam Bo faris sinsekvajn atakojn kontraŭ la usonaj kaj marionetaj trupoj. Laŭ nekompeta statistiko, en siaj bataloj en Trang Ba Diec, Dat Xi, Ben Cau kaj Batram-vojforko en la fronto de

Tay Ninh de la nokto de la 29-a de marto ĝis la 2-a de aprilo, la popolaj liberigaj armitaj fortoj ekstermis 4 malamikajn batalionojn kaj ĉ. 10 rotojn. Ili precipe donis pezajn batojn al la usonaj unua infanteria divizio, 25-a divizio kaj 11-a kirasita regimento. La armeo kaj popolo en la provinco Binh Tuy frakasis la "serĉan kaj detruan" operacion de la usona 199-a brigado en la sudo de Tinh Linh, mortigante ĉeloke la brigadestron kaj multajn usonajn armeanojn.

En la unuaj 8 tagoj de aprilo, la armeo kaj popolo de diversaj naciecoj en centra Tay Nguyen furioze atakis pli ol 50 malamikajn bazojn, aerodromojn kaj aliajn militajn objektojn kaj kaŭzis gravajn perdojn al la usonaj kaj marionetaj vivhavaj fortoj kaj militaj materialoj. Laŭ nekompeta statistiko, la popolaj liberigaj armitaj fortoj en Tay Nguyen mortigis, vundis kaj militkaptis pli ol 2,500 usonajn kaj marionetajn armeanojn, faligis kaj detruis 72 aviadilojn, detruis ĉ. 100 militajn veturilojn, 13 kanonojn kaj pezajn minjetilojn.

En la centraj ebenejoj de Trung Bo, la popolaj liberigaj armitaj fortoj akiris grandan venkon en sinsekvaj atakoj de la nokto de la 31-a de marto ĝis la 2-a de aprilo al pli ol 160 militaj objektoj en la areo de la norda parto de la provinco Quang Nam ĝis la provinco Khanh Hoa. Laŭ unuapaŝa statistiko, ĉ. 1,000 armeanoj de la usonaj,

Batalantoj de la popolaj liberigaj armitaj fortoj de la provinco Quang Tri de suda Vjetnamio furioze atakas apogpunkton de la usona kaj la pupa armeoj.



marionetaj kaj vasalaj trupoj estis ekstermitaj kaj 34 malamikaj militveturiloj estis detruitaj. La liberiga armeo de la provinco Binh Dinh en tiu regiono faris rimarkindan embuskon ĉe la ŝoseo n-ro 19, kaj komplete detruis transportan grupon de ĉ. 30 veturiloj, ekstermis pli ol 100 armeanojn de la usonaj kaj sudkoreaj vasalaj trupoj kaj militkaptis aŭ detruis ĉiujn armilojn kaj aliajn materialojn sur la veturiloj.

LA LAOSAJ PATRIOTAJ FORTOJ EKSTERMIS PLI OL 10,000 MALAMIKOJN

La laosaj patriotaj fortoj ekstermis 10,700 malamikojn en la kvin sekaj monatoj de novembro de 1969 ĝis marto de 1970, inkluzive grandan nombron da oficiroj de la marioneta armeo, tajlandaj komplikaj armeanoj, usonaj "konsilistoj" kaj "specialaj fortoj", kaj 92 usonaj aviadiloj estis faligitaj aŭ detruitaj.

La patriotaj fortoj militkaptis kaj detruis pli ol 2,700 armilojn de diversaj specoj, 160 radiotransigilojn, 179 militajn veturilojn kaj centojn da tunoj da armiloj kaj aliaj militaj materialoj.

Tiuj estis la kvin monatoj en kiuj iris la plej intensaj kaj plej oftaj bataloj de la armeo kaj popolo de Laoso post la triumfo akirita en la batalo de Nam Bak.

La brilaj venkoj akiritaj de la laosaj patriotaj fortoj en la seka sezono de kvin monatoj pruvis, ke la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj neniel povas eskapi el kompleta fiasko.



La armeo kaj popolo de norda Vjetnamio serioze punas entrudiĝintajn usonajn piratajn aviadilojn. Jen difektita korpo de aviadilo de la usona imperiismo kiun paffaligis la armeo kaj popolo de la provinco Quang Binh.



Artilerio de la laosaj patriotaj armitaj fortoj forte bombardas poziciojn de la malamiko.



Letero de Albana Leganto G. Ĉ.

Kvankam Albanio kaj Ĉinio estas apartigitaj de miloj da montoj kaj dekmiloj da riveroj, tamen niaj koroj estas interligataj. La du Partioj kaj du popoloj de Albanio kaj Ĉinio cementis sin per profunda revolucia amikeco en socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj en la batalo kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo. Mi plezure studas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj konigas ilin al miaj kamaradoj, tial mi petas vin pri sendado de informoj pri Ĉinio. Mi, samkiel ĉiuj albanaj instruistoj, studas ĉiutage dokumentojn de nia Partio kaj verkojn de Prezidanto Maŭ en Esperanto.

Floru por ĉiam la granda amikeco inter la du Partioj kaj du popoloj de Albanio kaj Ĉinio!

Vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj kamarado Enver Hoxha!

Letero de Brita Leganto P. H.

Mi opinias, ke vi faras grandan laboron por la Komunismo kaj Esperanto.

La kvalito de EPĈ estas ĉiam altega. La artikolo "En la Tagoj Kiam Ni Okupiĝis pri Esperantaj Laboroj en Jan-an" speciale interesas min.

Kun plezuro kaj intereso mi legis en numero 2, ke baldaŭ aperos en esperanta traduko "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong". Mi opinias, ke la mondo bezonas la klasikajn verkojn de Komunismo en Esperanto.

Letero de Kolombia Leganto J. M. G. O.

Multe plaĉas al mi via revuo, ĉar ĝi instruas al mi pri ĉina revolucia movado kaj kiel stas proleta movado sub gvido de la amata Prezidanto Maŭ Zedong.

Ja vere estas mirinde, kiel kreskadis progresema sinteno de la ĉina popolo. Mi vidis en koloraj fotoj vizaĝojn plenajn je feliĉo. Tio montras al ni, ke Ĉinio ne suferas plu fremdan subpremadon.

Mi ricevis bildkartojn baledo "Blankhara Knabino" kune kun la decembra n-ro de "EPĈ". Tio estas pruvo ke arta pensmaniero evoluas dank' al Maŭzedongpenso, kaj ĝi servas rekte por la amasoj.

Letero de Nov-zelanda Leganto M. L.

Permesu al mi esprimi mian estimon al EPĈ, plej bonkvalita, bela kaj imponega revuo. Ĝi vekis en

mi kaj multaj miaj samlandanoj novan intereson kaj respekton al la Ĉina Popola Respubliko kaj la ĉina popolo. Via laboro daŭre prosperu.

Lastatempe, oni propagandis, ke "la 21-a jarcento estos la japana jarcento". Mi ne kredas tion. Mi kredas ke la plej grava elemento de politiko kaj ekonomio mondaj en la venonta jarcento estos la Ĉina Popola Respubliko. Dum vi alproksimigas tiun celon, mi atendos viajn raportojn en EPĈ.

Daŭran sukceson kaj prosperon.

Letero de Itala Leganto G. G.

Hodiaŭ mi legis artikolon de via gazeto *Hongqi*, kiun oni represis. En ĉi-tiu artikolo oni diras, interalie, ke la ĉina registaro, saĝe gvidata de via granda estro Maŭ Zedong, lastatempe decidis, favore al la tuta ĉina popolo kaj precipe konsiderante ĝian veran sanon, doni la plej grandan impulson al disvastigo de kuracmetodo bazita sur medicinaj kreskaĵoj, krom, kompreneble, sur via glora, miljara "akupunkturo".

Mi senkondiĉe aprobas la nunan san-politikon de via klera registaro.

Ĉi-tio, miaopinie, estas granda, nediskutebla revolucio, kiun ankaŭ aliaj popolamaj homoj vivantaj en diversaj landoj devus entuziasme saluti.

SINSEKVAJ VENKOJ AKIRITAJ DE LA KAMBOĜA POPOLO EN LA PATRIOTA BATALO KONTRAŬ LA USONA IMPERIISMO

Senĉese venis ĝojigaj novaĵoj pri la venkoj akiritaj de la kamboĝaj popolo kaj patriotaj armitaj fortoj kiuj donis fortajn batojn al la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. La 7-an de aprilo, 1970, tri rotoj de la usona agre-sa armeo entrudiĝis en la regionon de Tamo en Choe-distrikto de la provinco Svay Rieng de Kamboĝo. La popolo kaj la patriotaj armitaj fortoj de tiu loko faris bravan rebaton, mortigis kaj vundis 70 usonajn agresajn

armeanojn, ke la ceteraj postvivantaj malamikoj fuĝis en paniko. Antaŭ tio, la kamboĝaj popolo kaj patriotaj armitaj fortoj brave faris obstrukcajn atakojn al la entrudiĝintaj sudvjietnamaj marionetaj trupoj en la regionoj Tamo kaj Tasach, mortigis kaj vundis ĉ. 100 el ili, detruis 10 malamikajn militajn veturilojn. De la 4-a ĝis la 6-a de aprilo, ili denove en la provinco Svay Rieng brave batis la reakciajn trupojn de la kliko de Lon Nol kaj Sirik Matak, eksterminte kaj grave vundinte 6 malamikajn rotojn. La kamboĝaj patriotaj armitaj fortoj faris multajn batalojn kontraŭ la dekstrulaj trupoj en pluraj provincoj kaj akiris venkojn unu post alia.

Specialaj eldonoj:

Popoloj de la Tuta Mondo,
Unuiĝu kaj Venku la Usonajn
Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn
Lakeojn!

Venke Certe Apartenos al la
Unuiĝintaj Kontraŭimperiismaj
Hindoĉiniaj Popoloj!

Sur la kovrilo:

Strikte sekvante la grandajn stra-
tegiajn dispoziciojn de Prezi-
danto Maŭ, la partia filio de
Cencun-brigado en antaŭurbo de
Kantono senĉese plirapidigas
ideologian revoluciigon per Maŭ-
zedongpenso kaj gvidas viglec-
plene la vastajn partianojn kaj
amasojn daŭre marŝi antaŭen
sur la larĝa socialisma vojo.
Jen la gvidantaro de la partia
filio studas verkon de Prezidanto
Maŭ.

Sur la dorskovrilo:

Kulturebligi virgan teron por
plivastigi agraron kaj fari pli
grandan kontribuon en plipro-
dukto de grenoj.

EL POPOLA ĈINIO

人民中国报道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 7 (144) 1970

Ĉefa Enhavo

- Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Ĝoje Celebras la
Internacian Laborulan Feston Kune kun Revoluciaj
Amasoj de la Ĉefurbo
- Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Akceptis Samdek
Norodom Sihanuk kaj Lian Edzinon
- La Mondaj Popoloj Varme Amas Prezidanton Maŭ
(bildserio)
- Marŝu de Venko al Pli Granda Venko laŭ la Direkto Mon-
trita de la Naŭa Kongreso de la Partio
- Nova Alta Tajdo de Revolucio kaj Produkto en Nia Lando
- Veterano de la Ruĝa Armeo — Ĉen Tianlong
- Elstara Komunisto Vang Guofu
- La Socialisma Nova Cencun
- Bona "Subplotonestro" en la Revolucia Komitato
- Nia Familia Kurso de Maŭzedongpenso
- Ĉinstila Forno por Kreskigo de Solkristalo
- Kion Mi Vidis kaj Aŭdis sur Hajnan-insulo
- Liu Ĝikuj — "Nudpieda Kuracisto" de Fiŝistoj
- Varma Aklamo al la Sukcesa Lanĉo de Nia Unua
Artefarita Tersatelito (bildserio)
- Indigne Tajdas la Batalo de la Kamboĝa Popolo
- Venke Certe Apartenos al la Popoloj de Hinduĉinio
- Nova Krime de la Sovetunia Reviziisma Renegata Kliko
Perfide al la Sovetunia Popolo

Komunistoj Batalantaj sur Diversaj Frontoj



La komunistino Ĝang Baŭfeng (meze) de la Tria Kemia Fabriko de Pekino persiste komandas la produkton per revolucio, tiel ke la tria grupo sub ŝia gvido gajnis la honoran titolon de avangarda kolektivo en du sinsekvaj jaroj.



La estro de la komutatora subplotono de la komunika roto de iu trupo de la Liberiga Armeo kaj komunistino Ĝong Ĝianping (dekstre) memkonscie kulturadas al si la revolucionan spiriton **“timi nek malfacilojn nek morton”**, kune kun siaj kunbatalantoj luktas en la neĝa arbaro por teni glatan funkciadon de la linio.



De dekkelkaj jaroj, la sekretario de la partia filio de la Dongliuŝangu-brigado de Hebej-provinco Lju Julian (la unua de maldekstre) konstante persistas en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kaj diligente remuldas sian mond-koncepton. Jen ŝi studas kune kun komunumanoj la *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*.

La elstara komunistino Vu Gujhian (la dua de dekstre), kiu plurfoje vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, kun zorgemo pri la tuteco en la sino bone plenumas sian propran laboron. Jen ŝi fervore instruas splisan teknikon al junaj laboristinoj.





Post reveno de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio, Vang Ŝanfu, pilotĉefo de iu eskadro de la aera armeo kaj aktivulino en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, pli bone plenumas sian taskon.



La intelekta junulino Ĝou Ŝukin (dekstre) fikslogiĝinta en la kamparo de Gilin-provinco glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento. Jen ŝi lernas de veterana kamparano scienca kultivon de plantidoj.





Supre dekstre: Memkonscie irante la vojon kombiniĝi kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, Ĝang Hingĉen (maldekstre), komunisto en la Esplora Instituto de Biologiaj Preparadoj de Ĉangĉun starigis en si la ideon fari sciencan esploradon por la revolucio. Jen li faras kune kun laboristo sciencan eksperimenton.

Maldekstre: Komunisto Vang Kiuŝeng (fronte), veterana vendisto de la Ruĝflaga Ŝtofvendejo en Nankino, neniam forgesis la klasan batalon, ĉiam persistas pri la socialisma direkto en komercado kaj estas laŭdata kiel ruĝa sentinelo ĉe vendotablo.



Dekstre: Komunisto Liu Zebin (la dua de maldekstre), estro de la kaldronegripa grupo de la mekanika kaj movforta laborejo de la Pekina Lana Teksejo gvidas la kamaradojn de sia grupo energie renovigi teknikon kaj redukti la konsumadon de karbo.

